februaro 1972
65-a jaro
n-ro 794 (2)

esperanto

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando



Vi trovos

sur la paĝoj 23-24 artikolon pri ĝenoj (kaj ĝemoj) de teknika tradukisto en industrio. La kreskanta internaciiĝo de industriaj kompanioj samtempe plipezigas la ŝarĝon de tiaj tradukistoj, kaj la vastiĝo de la Eŭropa Ekonomia Komunumo (vidu la apudan ĉefartikolon de d-ro W. Bormann) povas nur intensigi la bezonon. En mondo, kie malmultaj homoj regas perfekte eĉ sian gepatran lingvon (p. 25), lingvo-specialistoj plu restos tre gravaj kaj alte salajrataj oficistoj, ĝis la ĝenerala uzado de unu komuna lingvo faros el ili anakronismon.

En la momento, kiam ni povas publikigi tre bonaŭguran novaĵon el Portugalujo (p. 22), konvenas ĵeti rigardon en la historion de alia lando, kie iam trafis Esperanton persekutoj — nun, feliĉe, forpasintaj. Akompanas nin en tiu tempo-vojaĝo, sur la paĝoj 28-29, Ulrich Lins.

La ampleksa sekcio de lokaj, fakaj kaj personaj novaĵetoj (p. 32-33), freŝa literaturaĵo (p. 35) kaj karikaturo pri nuntempaj gejunuloj (p. 36) espereble iom kontraŭpezos la kelkfoje kritikatan seriozecon de nia oficiala organo.

Enhavo

21 La lingva estonteco de E.E.K. (Bormann)
22 Instruado de Esperanto denove permesita en Portugalujo
23 Ĝenoj de teknika tradukisto (Finlay)
24 Informoj de CED
25 Por pli efika informado (7): Senerara nacia lingvo (Lapenna)
26 Recenzoj
27 Laste aperis . . . (novaj eldonaĵoj)
28 La plej sekreta libro pri Esperanto (Lins)
29 Informejo
32 Loke — Fake — Persone
34 Leteroj de legantoj
34 Radio
35 Al la vento (Tvarožek)
36 TEJO
37 Komenco bona — ĉio bona
38 Kalendaro
38 Hungara Kultur-Festivalo
39 Oficiala informilo: n-ro 453
40 Anoncetoj

La kovrilo

Evidente la Semajno de Internacia Amikeco (la lasta kompleta semajno de februaro; ĉi-jare, 20-26 februaro) neniom efikus, se dum la resto de la jaro regus malamikeco. Aliflanke, en mondo 'eterne militanta', ne malutilas foje akcenti la pli pozitivajn sentojn de la homo, esperante, ke la sloganoj pri internacia amikeco restos en la memoro ankaŭ dum la ceteraj semajnoj de la jaro. Tion, ĉiuokaze, celas la Semajno de Internacia Amikeco, kaj la samon celas nia ĉi-monata kovrilpaĝa bildo. Inter la kaŭzoj de malpaco kaj malamikeco ofte troviĝas simplaj miskomprenoj aŭ nekomprenoj, kaŭzataj de la lingva baro, kaj tiujn kaŭzojn ni per la Internacia Lingvo povus grandparte elimini.

Okaze de la Semajno de Internacia Amikeco la redakcio proponas amikan manpremon al ĉiuj legantoj en naŭdeko da landoj sur ĉiuj kontinentoj.

esperanto, februaro 1972

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.
Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1882-1910).
Ĉefredaktoro: V. Sadler.
Redaktorino: Nagata A.
Inkluzivas la organon de TEJO "La Juna Vivo" (TEJO-paĝo).
Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Abonprezo por unu kalendara jaro: 22,50 gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 30,— gld.). Unuopa ekzemplero: 2,— gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Oceanio 20,90; Suda Afriko, Azio, Sudameriko 14,30; Mezafriko, Norda kaj Meza Ameriko 11,—; Mezoriento, Nordafriko 7,70 gld.
Anonc-tarifo: 1 p. 285 gld., 1/2 p. 150 gld., 1/4 p. 85 gld., 1/8 p. 50 gld. 1/16 p. 35 gld. Ripet-rabato 20%.
Banko: Bank Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-3001.
Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).
Telefono: (010) 36 15 39.
Telegramadreso: ESPERANTO ROTTERDAM.
Kompostita kaj fotografita en la Centra Oficejo de UEA.
Presita ĉe Grafika Entrepreno Tuijtel en Hardinxveld, Nederlando.
Legantoj en 89 landoj.

estraro de uea

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj: Prof. d-ro Ivo Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Mddx, HA9 8TF, Britujo.
Vic-prezidanto kaj estrarano pri administrado kaj komercaj kaj industriaj rilatoj: E.L.M. Wensing, Postbus 72, Valkenswaard NB, Nederlando.
Vic-prezidanto kaj estrarano pri turismo kaj aŭtomobilismo: E. Carlén, Yxhult, S 690 60 Hällabrottet, Svedujo.
Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado, delegita reto, junularo kaj diskonigo de la agado de UEA: G. Becker, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 2, F.R.Germanujo.
Estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj kaj pri organiza plifortigo: D-ro W. Bormann, D-205 Hamburg 80, Schärstr. 26, F.R.Germanujo.
Estrarano pri kulturaj aferoj: J. Uśpieński, Warszawa-12, Poŝtkesto 100, Pollando.
Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-ro J.C. Wells, 17 Ashbourne Terrace, London SW19 1QX, Britujo.
Estrarano pri financo: E.J. Woessink, Onder de Beumkes 29, Velp (Gld.), Nederlando.

LA LINGVA ESTONTECO DE E.E.K.



Kun ioma indigno ekstereŭropaj esperantistoj konstatis, ke UEA havas "Komisiiton por Agado en Eŭropo". Ankaŭ eŭropaj esperantistoj miris pri la koncepto de "Eŭropo" ĉe tiu komisio: ĝi celas nur la landojn de la t.n. "komuna merkato" (Belgujo, Francujo, F. R. Germanujo, Italujo, Luksemburgo, Nederlando, nun ankaŭ Britujo, Danlando, Irlando kaj Norvegujo). Prave orienteŭropanoj grumblis, ke tio ŝajnigas ilin ne-eŭropanoj. Mi konsentas kun ili ĉiuj, kvankam mi mem estas tiu komisiito. Kaŭzas la malagrablan senton mallongigo de la nomo por la komisio. La agantoj en tiu "eŭropa" afero nomas sian laboron la kampanjo "Esperanto en la eŭropa integriĝo". Laŭ *Plena ilustrita vortaro* "integriĝi" signifas "eniĝi en tutaĵon, tiel ke oni komplete fandiĝas en ĝin". La agado por Esperanto en la eŭropa integriĝo do okazas tie, kie iuj eŭropaj ŝtatoj kunfandiĝas al nova unuo cedante la suverenajn rajtojn paŝon post paŝo al nova — centra aŭ federacia — registaro.

Ne eblas neglekti nove aperantan ŝtaton

Estus domaĝe por la monda aspiro de la Internacia Lingvo, se okazus regionaj apartiĝoj, kaj danĝere, se tiuj ĉi estus eŭropaj, ĉar Eŭropo certe estas tro peza en la tutmonda Esperanto-movado kaj en la neŭtrala lingvo. Sed, ĉar ni devas turni nin al ĉiuj decidrajtaj ŝtatoj kun nia postulo enkonduki Esperanton, ni ne povas neglekti nove aperantan ŝtaton, al kiu ni nun tuj devas ankaŭ turni nin. Tial laboro por Esperanto en la eŭropa integriĝo estas nepre necesa, kaj nenion fari signifus rezigni en grava tereno.

La faktan potencon en nia nuna mondo havas ankoraŭ la naciaj registaroj kaj ne jam la supernaciaj instancoj. Tio validas monde (kie nur estas internaciaj instancoj) kaj eŭrope. Tial estas preferinde, ke kun la fortaj naciaj registaroj kontaktu la naciaj Esperanto-organizaĵoj. La aktivado ĉe la malrapide pligraviĝanta centra instanco de la integriĝo, la Komisiono de la Eŭropa Ekonomia Komunumo en Bruselo, estas komuna tasko, farebla aŭ de iuforma eŭropa Esperanto-organizaĵo aŭ de komuna komitato de la kunlaborantaj landaj asocioj en la Esperanto-movado. Por klare distanciĝi de eĉ nur la ŝajno de eŭropismo okcidenta la prilaborantoj de la problemo decidis apogi la laboron plene sur la landaj movadoj. Iam ni certe havos unu "landan" Esperanto-asocion por ĉiuj landoj de la komuna merkato, same kiel en Usono aŭ en Sovetunio estas nur unu landa asocio, sed momente la tempo ankoraŭ ne estas matura por tio. Nun nur fondiĝis laborkomisionoj en la unuopaj landoj aŭ la landa asocio mem transprenis la prilaboradon de tiu speciala agado. La kunordigon faras la UEA-komisiito.

Unuecigo en multaj kampoj

Ĉiu plurnacia kaj do plurlingva establaĵo havas lingvan problemon. En integriĝo ĝi estas speciale prema, ĉar tiukaze ne temas nur pri iu kunlaboro en pintaj pozicioj, sed pri unuecigo en multaj kampoj, kiu eliras de la ekonomio, sed plurvoje — ekzemple per libera migrado de laboruloj, dungo en internaciaj trustoj, studo en centraj altlernejoj, partopreno en la centra gvidado kaj administrado — etendiĝas al la privata sfero de la enloĝantoj. Ĉiu homo devas havi la rajton, partopreni la vivon en sia ŝtato sen lingva diskriminacio, ankaŭ se tiu "ŝtato" konsistas el pluraj landoj. Do oni ne povis akcepti lingvan hegemonion, t.e. la superregon de unu lingvo, sed devis garantii samrajtecon al la lingvoj en la integriĝo. Feliĉe nun la komuna merkato havas nur kvar lingvojn: franca, germana, itala, nederlanda. En la oficiala uzo ili estis same praktikataj, kaj private eblis aranĝiĝi. Tiu stato estas ankrita en la traktato de la Eŭropa Ekonomia Komunumo kaj en dekretoj.

Nun aliĝas novaj landoj kaj enpenetras novaj lingvoj, inter ili la forta angla. La ĝisnuna prilingva trankvilo ĉesos. Kiel funkciigi komunumon kun abundo da lingvoj? Prezidanto Pompidou proponis koncentri al unu lingvo, la franca. Sed tio kontraŭus esencan neceson de integriĝo, kaj jam britoj kaj germanoj rifuzis definitive la ideon. Restos do plurlingveco. Sed jam montriĝis ruza sinteno limigi la nombron de la lingvoj.

Meze de novembro 1971 kunvenis la kulturministroj de la ses nunaj membroŝtatoj por plenumi devon el la traktato: fondi eŭropan universitaton por plej altaj studoj kun sidejo en Firenze, Italujo. Unu el la provizore ne solvitaj punktoj estas la demando pri la lingvoj. En la ministra konferenco estis proponite,

W. Bormann

INSTRUADO DE ESPERANTO DENOVE PERMESITA EN PORTUGALUJO

La situacio de Esperanto en Portugalujo estis delonge necerta. Ĉiuokaze, en la lastaj jardekoj povis nek okazi kursoj nek funkcii landa asocio. La samo validis, kun varioj, ankaŭ en Angolo, Mozambiko kaj aliaj teritorioj sub portugala regado. Tial la ĉi tie raportita ŝanĝo povus havi pli vastan signifon.

Post interrompo de 23 jaroj, la instruado de Esperanto estas nun denove permesita en Portugalujo. Per letero n-ro 7682 de la 19a de oktobro 1971, adresita al la Centro de Elementa kaj Perfektiga Lingvo-instruado en Lisbono (Centro de Iniciação e Aperfeiçoamento de Línguas), la Supera Inspektoro pri privata instruado ĉe la Ministerio de Nacia Edukado informis, ke "per decido de la Konstanta Konsilantaro pri Eduka Agado, konfirmita per la subskribo de Lia Ekscelenco la Ministro de Nacia Edukado, la 26an de junio de la kuranta jaro, estis PERMESITA la instruado de Esperanto en Portugalujo."

Ĝuste tiu sama Konsilantaro pri Eduka Agado, kun konfirmo de la subsekretario de la Ministerio de Edukado la 21an de oktobro 1948, malpermesis la instruadon de la Internacia Lingvo en Portugalujo. Ankoraŭ en 1969 ĝi konfirmis la ĝistiaman malpermeson. Restas necerte, ĉu ankoraŭ validas la decido de la Ministro de Internaj Aferoj de la 11a de aŭgusto 1948, kiu malpermesis ankaŭ presaĵojn kaj agadon Esperantajn.

La menciita lingvo-lernejo, kun centroj en Lisbono kaj Coimbra, tuj komencis senpagan 5-semajnan intensan Esperanto-kurson la 8an de novembro 1971. Partoprenis 25 lernantoj. La direktoro de la lernejo, d-ro Correia Coimbra, intencas efektivigi ĉiujare 3 tiajn kursojn. En la fino de decembro li vizitis la Centran Oficejon de UEA por interkonsiliĝi pri la estonta agado.

La lingva estonteco de EEK

(daŭrigo de p. 21)

ke nur du lingvoj estu uzataj: la franca (plej grava en la komuna merkato) kaj la angla (ne forŝovebla pro la monda signifo, kaj post kiam la aliĝo de Britujo estas certa). Kontraŭ tiu propono protestis la germana ministro Leussink. Liaj argumentoj estis tiel trafaj, ke li sukcesis ŝanĝi la rilaton de la voĉdonado (5 voĉoj por franca/angla, 1 voĉo kontraŭ): la ministroj akceptis la normalan lingvan regulon, t.e. samrajta uzo de la kvar lingvoj de la komunumo, kaj aldone akceptis la anglan, la lingvon de unu el la novaj membroj. Nun kvin lingvoj — angla, franca, germana, itala, nederlanda — estas oficialaj, kaj por la praktika uzo dum unu seminario la partoprenantoj decidos kiun lingvon preni el ili.


Klara diskriminacio kontraŭ danoj, norvegoj

Simple forŝovitaj estis la lingvoj de la aliaj novaj ŝtatoj. Dano aŭ norvego ne povos studi en Firenze en la gepatra lingvo. Por civitanoj el tiuj ŝtatoj ne sufiĉas, esti ekz. bona fizikisto, sed ili devas ankaŭ esti bonaj sciantoj de unu el la oficialaj lingvoj (kiu povus ankaŭ esti la nederlanda). Danoj kaj norvegoj, kaj irlandanoj, ne povas toleri tiun klaran diskriminacion. Alie oni havus en la integriĝo la privilegiitojn kaj la malfavoratojn. Sed tio ne nur estas grava demando por malgrandaj eŭropaj ŝtatoj, ĝi estas principa demando tuŝanta la tutan problemon de lingva diskriminacio.

Fakte Esperanto estus la solvo en tiu komplika situacio. Ni devas atentigi pri ĝiaj ebloj, sed estus malracie pensi, ke la Internacia Lingvo povus nun sturme venki. Do ni esperantistoj devas klopodi ĉe la decidrajtaj instancoj, ke ili prenu Esperanton en la servon de la integriĝo, probable sen ke la Internacia Lingvo fariĝas jam nun la ĉeflingvo de la komunumo. Tio povus okazi ekz. per enkonduko en la lernejojn por ĉiu infano de la integriĝantaj landoj, aŭ per akcepto kiel administracia helplingvo, aŭ en iu celkonforma maniero. Sed verŝajne la eŭropaj instancoj postulos de ni la pruvon, ke nia aserto pri la kapabloj de la Internacia Lingvo estas prava. Tio signifas ekspertan esploradon, kaj por faciligi la tutan procedon, la kunagantaj Esperanto-organizaĵoj decidis dekomence alstrebi tiun sciencan pritrakton.

Je la jarŝanĝo 1971/1972 la landaj asocioj de UEA en la ŝtatoj de la komunumo, nunaj kaj membriĝantaj, sendis la proponon al siaj registaroj kaj parlamentanoj, ke esplorkomisiono estu establita, en kiu lingvistoj, lingvoinstruistoj kaj — pro la organizaj problemoj — altaj oficistoj serĉu solvon de la lingva problemo ekzamenante Esperanton; tial, cetere, ankaŭ esperantistoj devos esti membroj de tiu komisiono. La argumentado por Esperanto estas tiel bone ellaborita kaj ege konvinka, ke iu paŝo antaŭen por Esperanto devos veni de tiu laboro. Tiam la tuta, mondvasta Esperanto-movado, la esperantistoj en ambaŭ hemisferoj de la terglobo, ĝuos progreson en niaj komunaj klopodoj por la Internacia Lingvo.

ĜENOJ DE TEKNIKA TRADUKISTO



© *ICI Magazine*

La taskoj de teknika tradukisto en industria entrepreno estas aparte pezaj: neregulaj laborhoroj, cerbostreĉaj lingvaj malfacilaĵoj kaj la neceso iel sekvi la nesekveble rapidan evoluon de la tekniko mem — ĉio ĉi kaŭzas, ke tiaj specialistoj estas vere maloftaj estaĵoj. Des pli interese, do, kiam unu el ili paŭzas en sia laboro por iom priskribi sian vivon kaj siajn taskojn. La ĉi-suban artikolon de Ian Finlay esperantigis Denis Williams.

Ĉiu okupo havas siajn ĝenojn kaj afliktojn, kaj rilate al la teknika tradukado tio estas eble pli vera ol la multaj aliaj okupoj. Por tio estas kelkaj kialoj.

Unu el la plej gravaj estas, ke la tradukisto dungita de industria entrepreno estas iom nova kaj ankoraŭ sufiĉe rara ido. Estas malpli ol dudek plene okupitaj teknikaj tradukistoj en la tuta komplekso de ICI[1] en Britujo, kaj eble ne pli ol kvincent entute en brita industrio.

Tio ĉi egaligas ilin almenaŭ nombre (en Britujo) al kvalifikitaj patento-agentoj, dum iliaj lingvaj kolegoj, plenokupitaj konferencaj interpretistoj, estas eble tiel maloftaj, kiel plenokupitaj orkestraj direktilistoj! Tiu ĉi rareco kune kun la relativa noveco de la ofico — grandaparte post la dua mondmilito — rezultigas multe da konfuzo pri kaj ĉirkaŭ ĝi, envolvanta ne nur la klientojn de la tradukisto sed ankaŭ la tradukiston mem.

Dudek industrie gravaj lingvoj

Unue, estas proksimume dudek lingvoj, kiuj estas gravaj en unu aŭ alia branĉo de industrio, kvankam la pli granda parto de ĉio tradukota en la anglan lingvon estas probable en nur dek lingvoj. La tradukisto eble povas regi dek el ĉi tiuj dudek aŭ pli da lingvoj — en iom mallarĝa tereno — sed oni ne povas atendi, ke li traktu la aliajn iel adekvate. Eĉ se li scipovas multajn lingvojn, li scipovas ne ĉiujn! Oni scias, ke almenaŭ partoj de la Biblio jam estas tradukitaj en multe pli ol mil lingvojn kaj dialektojn, kaj ke la tuta nombro parolata tra la mondo atingas kelkajn milojn.



Ian Finlay

Due, se la tradukisto ne estas denaske dulingva, tre malkonsilinde estus ke li traduku el sia propra lingvo, aŭ lingvo de kutima uzado, precipe se la tradukaĵo estos uzata por eldonaĵo aŭ por presaĵo por reklamaj aferoj. Tiu ĉi hezitemo povas kompreniĝi kiel falsa modesteco flanke de liaj klientoj, sed simpla rigardo al la provoj de kelkaj, al kiuj tiu modesteco mankas, kutime montras, ke tia sinteno estas prava. Tia tromemfido jam multekostis al pli ol unu brita industriisto ĉe internaciaj ekspozicioj.

Konvinkinte sian dunginton aŭ estron, ke li ne estas lingva ĉionscianto, nek nature dulingva, sed nur provas traduki el ĝis dek lingvoj en sian propran lingvon, la tradukisto devos establi la fakton — ofte tro memevidentan en iuj el liaj provoj — ke li ankaŭ ne estas ĉionscianto. Granda firmo havas multajn spertulojn en sennombraj sferoj — kelkokaze sciantajn pli kaj pli (precize aŭ multe) pri malpli kaj malpli (larĝiĝanta tereno)[2] — kaj ĉiu je unu okazo aŭ alia povas doni al la tradukisto laboron. Tial estas apenaŭ racie atendi, ke li antaŭhieraŭ estu spertulo pri entreprena financo, hieraŭ pri elektraj aferoj, hodiaŭ pri la fizikaj fenomenoj de duonkondukantoj, pri komputerigitaj pakaĵoj morgaŭ aŭ pri teksbaza-trikado postmorgaŭ! Sed li devas havi larĝan, ĝeneralan scion, kaj vastajn interesojn, estante ia kameleono je du niveloj, lingva kaj faka.

Kiam la tradukisto pledas por nescio pri la temo, ja estas maltaŭge, ke la kliento responde montru al la biblioteko da vortaroj, ensŝrankigita sur la muro de lia oficejo. Vortaroj, kiel ĉiuj konsultiloj, estas jam tre eksmodaj, eĉ antaŭ ol ili estas presataj, precipe en rapide ŝanĝiĝantaj teknologiaj fakoj, kaj kutime ĝuste tiu vorto, kiun oni bezonas, en neniu el ili. Kolegoj kaj klientoj povas ofte helpi, klarigante la signifon de neakceptebla vorto. Oni devus ankaŭ mencieti, ke sciencistoj ofte ne estas la plej bonstilaj man-skribantoj; tial la tradukisto tre multfoje devas lukti kun malbone man-skribitaj originaloj, kaj kelkfoje kun misfaritaj kopioj.

Multaj terminoj estas regionaj relikvoj

La tradukisto laboranta en la sfero de teksaĵoj estas en iom malpli bona pozicio, ol multaj aliaj. La teksa industrio estas praeca, treege tradiciema, precipe en landoj kiel Britujo kaj Francujo, kaj multaj terminoj estas regionaj relikvoj de la hejmlabora sis-

---

1. Imperial Chemical Industries Ltd. ("Imperiaj" kemiaj industrioj); ĉefoficejo — Londono.
2. Ŝerco pri sciencistoj, kiu finiĝas jene: "Fine ili scias ĉion pri nenio! "

ĜENOJ DE TEKNIKA TRADUKISTO

(daŭrigo de p. 23)

temo, kiu ekzistis antaŭ la industria revolucio (18a jarcento). Krom tio, multaj terminoj rilataj al la klasikaj, naturaj fibroj, kotono kaj lano, estas elŝiritaj el sia kunteksto kaj transigitaj, ne ĉiam tre felice, en la sferon de artfibra fabrikado kaj procedado. La vortprovizo postulata de la modo estas mondo propra, ofte spitanta la vervan imagopovon de la redaktantoj (reklamverkistoj).

La tradukisto ricevas multajn petojn, etendiĝantajn de la racia kaj ebla, al la tute senracia kaj malebla. Li ne ĉiam povas fari hodiaŭ tion, kion oni devus esti petinta jam hieraŭ, sed aliflanke estas ofte surprize, kiel rapide li povas labori, precipe se li mem tajpas, tiel finlaborante unupaŝe. Li sin trovas devigata doni konsilon pri tio, kiel oni prezentu sin aŭ alparolu al fremdlandaj homoj kaj dečifru malbone manskribitajn korespond-amikajn leterojn, la efemerajn fruktojn de ferioj eksterlandaj.

Ero en multaj ĉenoj

Li eĉ de tempo al tempo povas mem ĝui iom da interpretado, kiu, kompreneble, ne estas simila al tradukado, ne pli multe ol, ekzemple, la laboro de notario al tiu de advokato. Povas esti, ke li trovos sin instruanta la elementajn principojn de la franca aŭ germana lingvoj al siaj teknikaj kolegoj. Li estas ero en multaj ĉenoj de laboro, kaj diversaj kolegoj dependas de li en tre diversaj manieroj.

Kvankam maŝinoj ŝajnis malcertigi lian estontecon antaŭ kelkaj jaroj, tiu minaco nun ŝajnas esti forpasinta, kaj li daŭrigas la laboron, akceptante ĉiun novan taskon kaj kiel defion kaj kiel ludon kun vortoj. La teknika tradukisto estas nun konstanta parto de la industria sceno, kaj ŝajnas, ke tia li restos tiel longe, kiel multlingveco mem daŭros.

INFORMOJ DE CED

CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO PRI LA MONDA LINGVO-PROBLEMO
77, Grasmere Avenue, Wembley, Mddx., HA9 8TF, Britujo

SURBENDIGITA FORUMO PRI LA PROBLEMO DE LINGVA KOMUNIKADO

S-ro P. Schilperoord, membro de la LKK en Londono kaj komisiito por la magnetofona servo, surbendigis preskaŭ ĉiujn eventojn dum la pasinta UK en Londono. Interalie, la tuta debato en la Dua Ĝenerala Kunveno (Forumo), pritraktinta la problemon de lingva komunikado en la moderna mondo, estas komplete surbendigita. La surbendigo – kiel, cetere, ĉiuj aliaj – estas bonega. Oni povas perfekte aŭdi ĉiujn raportojn, respondojn, intervenojn en Esperanto kaj en angla traduko, aŭ en la angla kaj en Esperanta traduko (la du lingvoj estis laboraj por ĉi tiu kunveno); oni aŭdas ridojn, aplaŭdojn kaj bruojn. La bendo plene reflektas la okazaĵojn dum ĉi tiu gravega kunveno, ĝis nun unika en niaj universalaj kongresoj.

La personoj, kiuj ĉeestis la debaton, sendube ŝatos reaŭdi ĝin; tiuj, kiuj ne povis ĉeesti la Kongreson aŭ la Forumon, povas nun partopreni en la ekscita evoluo de la diskuto.

La bendon pri la Forumo, kiel ankaŭ aliajn bendojn pri diversaj partoj de la programo de la UK en Londono, oni povas mendi ĉe la Magnetofona Servo de UEA, komisiito s-ro Rüdiger Eichholz, 2040 Springbank Road, Mississauga, Ontario, Kanado. La prezoj estas indikitaj en la Jarlibro de UEA, 1971, Dua Parto, p-oj 120-122.

KRESKANTA PRESTIĜO DE LMLP

Kiel la iniciatintoj atendis, la periodaĵo *La monda lingvo-problemo* (LMLP), eldonata de Mouton sub aŭspicio de CED, elvokis la merititan interesiĝon en ĉiuj seriozaj medioj interne de la Esperanto-movado, kaj, eĉ pli grave, ekster ĝi. La prestiĝo de la revuo kreskis de numero al numero. Elstaraj estis la recenzoj de D. B. Gregor en *The British Esperantist* (februaro 1970); de d-ro Carlo Minnaja en *L'Esperanto,* n-ro 133-134, en *Pola esperantisto*, n-ro 2/69 kaj en kelkaj aliaj esperantlingvaj periodaĵoj.

La eĥoj en la ekstera mondo estis konsiderinde pli abundaj, ĉiuj pozitivaj. Pluraj gravaj nacilingvaj periodaĵoj citis el LMLP. El la plej lastaj sufiĉas mencii la unuarangan periodaĵon *The Incorporated Linguist*, organo de la monda prestiĝa "The Institute of Linguists" en Londono. En la artikolo de N. Denison "The use of English as a medium of communication in Europe" (La uzo de la angla kiel rimedo de komunikado en Eŭropo), publikigita en la numero 2 de aprilo 1971, LMLP estas citita 6 fojojn. Pri unu el la artikoloj estas dirite: "Koncerne la oficialan kaj juran pozicion de la angla, franca kaj aliaj lingvoj en internaciaj rilatoj, ĉu antaŭ ĉu post la fondiĝo de Unuiĝintaj Nacioj, ni nun havas du bonegajn artikolojn de I. Lapenna en la unua kaj dua numeroj respektive de la nova (ekde januaro 1969) periodaĵo, publikigata de Mouton por la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Lingva Problemo, kaj nomata *La monda lingvo-problemo.*"

Alia interesaĵo: En la gazeto *Diario el Grafico*, n-ro 2496 de la 30a de majo 1971, Gvatemalo, aperis tutpaĝa resumo de la artikolo de K. H. Pfeffer "La lingva problemo kaj la socia malpaco en Pakistano", publikigita en n-ro 3 de la unua volumo de LMLP.

Tiuj kelkaj ekzemploj sufiĉu por montri la prestiĝon, kiun ĝuas kaj espereble plu ĝuos LMLP.

Donacoj por la revuo "La monda lingvo-problemo" en 1971 (gld.)

Institucio Hodler '68: 750,–. Danlando: s-ro P. V. Bagger, 42,–; s-ro G. Jørgensen, 5,–. Entute donacitaj ĝis nun por LMLP: 19 248,74 gld.

POR PLI EFIKA INFORMADO* (7)

SENERARA NACIA LINGVO

IVO LAPENNA

"Skribi pri Esperanto en nekorekta nacia lingvo" estas unu el la eraroj, kiujn la Principaro de Frostavallen[1] listigas en la konciza ĉapitreto pri la kvalito de nia informado.

Kial necesis aparte mencii ĝin? Ĉu ne estas memkomprenebla afero, ke ĉiu persono bone parolas kaj skribas sian propran nacian lingvon?

Multaj ne regas la propran nacian lingvon

Bedaŭrinde, ne estas tiel. Kvankam en ĉiu lando de la mondo oni lernas dum multaj jaroj la norman lingvon de la koncerna nacio, kaj kvankam pluraj aliaj faktoroj kontribuas al la kompletigo de tiuj studoj (literaturo, gazetaro, radio, televido ktp.), tamen relative malmultaj plene ekregas ĝin. Tutaj tavoloj de la popolo, eĉ en landoj kun vasta edukado sur tre alta nivelo, por ne paroli pri la aliaj, fakte ne scias sian propran nacian lingvon. Ne estas nia tasko ekzameni ĉi tie pli detale la aferon, sed necesas konstati la fakton, ke ne ĉiu sukcesis ekmastri sian propran nacian lingvon, aŭ eĉ nur atingi kontentigan nivelon. La personoj sciantaj la Internacian Lingvon ne estas escepto, kvankam la kono de Esperanto kutime helpas ilin pli bone kompreni la propran nacian lingvon.

La grado de lingvoscio estas multrilate legitimacio de personaj edukiteco kaj klereco. Ju pli granda la vortprovizo, la rego de la gramatikaj formoj, la majstrado de la stilo, des pli alta la persona reputacio kaj tial, aŭtomate, des pli granda la prestiĝo de la eldiritaj pensoj, eĉ senkonsidere al la fakto, ke sen mastrado de la lingvo ne eblas sukcese argumenti por kio ajn, eĉ ne por la plej justa afero.

Sur la kampo de informado pri Esperanto oni senĉese uzas naciajn lingvojn, parole kaj skribe, sur tri niveloj: originala verkado, tradukoj kaj interpretado.


Parole oni uzas la lingvon por prelegoj, paroladoj, intervjuoj, debatoj, personaj kontaktoj, radio-programoj k.s. *Skribe* la naciaj lingvoj estas uzataj por verkado de originalaj artikoloj kaj informoj, en afiŝoj, flugfolioj, broŝuroj kaj en aliaj kazoj.

Tute egale, ĉu oni uzas la lingvon parole aŭ skribe, lingva korekteco estas antaŭkondiĉo de kia ajn pozitiva rezulto. Se temas pri skribita teksto, oni povas — kaj devas — en dubaj kazoj konsulti bonan vortaron aŭ gramatikon, interkonsiliĝi kun pli bona scianto de la lingvo aŭ eĉ peti lin trarigardi kaj korekti la tekston. Oni neniam tro fidu je sia propra lingvoscio. Se temas pri la uzo de la lingvo parole, precipe por prelegoj kaj paroladoj, la sola ebleco estas bone kaj konscience sin prepari, kaj entute observi almenaŭ la bazajn principojn de parolarto.[2]

Respondeca kaj malfacila tasko

La tasko de tradukanto estas eĉ pli respondeca kaj malfacila. En la kadro de la priparolata demando oni plejparte tradukas informojn el la bultenoj de la Internacia Gazetara Servo (IGS) kaj de la Kongresa Gazetara Servo (KGS) de UEA, aŭ dokumentojn de CED, aŭ diversajn artikolojn kaj novaĵojn el la Esperanto-gazetaro. Kutime, do, la tradukoj estas farataj el Esperanto en diversajn naciajn lingvojn, tre malofte inverse.

La enhavo de la menciitaj informoj, artikoloj, dokumentoj kaj novaĵoj estas kutime altnivela, sed malserta traduko povas komplete detrui ilian valoron.



Malgraŭ multjara lernado en la hejmo, lernejo kaj ĉiutaga vivo, relative malmultaj personoj perfekte mastras la propran nacian literaturan lingvon, en kiu en la plej multaj kazoj svarmas neregulaĵoj.

Por ke tio ne okazu, necesas, unue, tre atente traduki la koncernan tekston — pli la sencon, ol la unuopajn vortojn — kaj poste glatigi la krudaĵojn kaj poluri la tuton. Bona traduko estas tiu, kiu ne sentiĝas kiel traduko, sed estas legata kiel originalaĵo. Se temas pri speciale grava teksto, estas ĉiam bone peti alian kompetentan personon atente tralegi ĝin, ĉar tre verŝajne postrestis malglataĵoj, kiujn la tradukinto, sub la influo de la originalo, ne rimarkis. Eĉ CED, en kiu kunlaboras kelkaj vere kompetentaj tradukantoj, ĉiam agas tiel.

Ne ekzistas adekvata vorto por emfazi la eksterordinaran gravecon de korekta, senerara lingvo. Se teksto, maksimume perfekta el lingva vidpunkto, per si mem donas prestiĝon al la enhavo, malbona lingvo kun multe da gramatikaj eraroj kaj mizera stilo ne nur ruinigas eĉ la plej saĝan argumenton, sed ankaŭ per si mem estas rekta propagando kontraŭ Esperanto. La homoj prave diras: unue lernu vian propran lingvon, kaj poste parolu al ni pri Esperanto.

Interpretado estas eĉ pli malfacila. Tial al ĝi estos dediĉita tuta artikoleto en la sekvonta numero.

---

* La antaŭaj artikoloj en tiu ĉi serio aperis en la revuo "Esperanto" n-roj 7-8/1970, kaj 1, 2, 4, 5, 6 de 1971.

1 Publikigita en la broŝuro "Statuto kaj Regularoj de UEA" (1968), p-oj 58-63.

2 Multaj detaloj pri tio troviĝas en la verko "Retoriko", tria eldono, Rotterdam 1971; pri la lingva kulturo precipe p-oj 167-183 kaj 198-206.

La poeto de la poetoj

Recenzas Julius Balbin (Novjorko):

La kremo de Kalocsay: malgranda albumo el lia verko originala kaj traduka okaze de la okdekjara datreveno de lia naskiĝo. Bristolo (Britujo): Bristola Esperanto-Societo, 1971. 56 p. 22cm.

La plaĉaspekta libro, kiun la Bristola Esperanto-Societo ĵus eldonis omaĝe al la 80-jara naskiĝtago de Kalocsay, "la poeto de la poetoj", kiel lin nomis W. Auld, klopodas iagrade kontribui al la plenigo de la manko de reeldonado, – manko, kiu povus katastrofe efiki sur la kontinueco de nia literatura tradicio.

La libro dividiĝas en du egalajn partojn, la originalan kaj la tradukan. La tradukoj disponigitaj al nia ĝuemo devenas el ĉiuj periodoj de la aŭtoro, ekde "Eterna Bukedo" ĝis la ŝekspiraj dramoj, kaj ilustras ĉiujn facetojn de lia traduka genio; tiujn, kvazaŭ antaŭdire, li elnombris jam en 1926, en unu el siaj recenzoj: "Granda ekzerco, funda studo, vigla sento pri la logiko kaj gusto de la lingvo, sagaco, spirito, eltrovemo kaj ama pacienco....'

La originalaĵoj estas ĉerpitaj el *Streĉita kordo, Rimportretoj, Izolo* kaj la kajeroj de *Literatura mondo.* Jen la fascina kolekto da "rafinitaj, delikatgustaj poemoj, en kiuj ĉiu vorto ludas sian precizan rolon, kiel marmorero en rava mozaiko" (W. Auld).

La nura bedaŭrindaĵo estas la fakto, ke el 28 originalaj poemoj 17 estis jam inkluzivitaj en la *Esperanta antologio* kaj en *Ora duopo* respektive. Ĉu ne eblis kolekti sufiĉe da kremo Kalocsay'a sen ĉerpi tiel malavare en la reeldonoj jam alireblaj al la nuntempa legantaro?

Mendu ĉe UEA: 3,50 gld. (por Nederlando 3,64 gld.) + sendokostoj 10%.



Originala "Reto" en Parizo

**SCENO EL 'LA RETO',
prezentita en kafejo-teatro Absidiole
en Parizo. De maldekstre: Broutin (la vinportisto), Antoinette Leroux (Monika) kaj
Michel Audibert (Kegel).**

Recenzas J. A. Rousseau (Parizo):

La reto*, de Bukar. Aabyhøj: Dansk Esperanto-Forlag, 1971. 32p. 21cm.

En senklientan spicejon envenas homo! Kia ŝanco! Monika, unubraka junulino, estas sen okupo. La etoso estas favora je konfesoj, eltiritaj cetere per la trafaj demandoj de Kegel, asekurinspektoro, kiu scias pli, ol oni konjektas, pri ŝi. Post paŭzeto, la dialogo rekomenciĝas. Kegel klopodas eltiri el ŝia vilaĝaĉo Monikan, kiu ŝajnas tute preta pluvivi tie! kaj klopodas trovi bonajn kialojn por tio. Sed Kegel daŭrigas siajn demandojn, al kiuj li ricevas novajn konfesojn. Fine Kegel informas Monikan, ke ŝi rajtis ricevi monkompenson pro sia akcidento; sed tiu kompenso ja estis enkasigita de fripona asekurkompania oficisto. Li donas al ŝi unuan ĉekon de 5 000 F. kaj promesas, ke li dungigos ŝin en la kompanio. Monika povus denove eniri en la vivon . . .

Sed ŝia patrino havas aliajn ideojn. Per la mono ricevita, ŝi povos forlasi la spicejon kaj resti en sia vilaĝo. La reto refermiĝas tutcerte sur Monika!

Dum tri semajnoj tiu teatraĵeto esperantlingva estis ludata en kafejo-teatro Absidiole (Parizo). Ĉiutage publiko (eĉ plurfoje neesperantista) aplaŭdis varme la geaktorojn, samtempe la aŭtoron kaj enscenigiston.

Mendu ĉe UEA: 2,– gld. (por Nederlando 2,08 gld.) + sendokostoj 10%.

* Radio "France Inter" disaŭdigis en la 27a de novembro 5-minutan intervjuon kun Bukar, aŭtoro de "La reto", kiun oni prezentis Esperante dum tri semajnoj en Parizo. (red.)

Ĝustatempa eldono por franclingvanoj



Recenzas Robert Lloancy (Tunisio):

Vocabulaire Espéranto: Laŭtema Esperanta-franca vortareto, de Michel Duc Goninaz. Parizo: "Editions Ophrys", 1971. 118 p. Ilus. 24 cm.

Jam de longe por franclingvanoj ne plu estis trovebla vortaro laŭtema, kaj tiu manko akre sentiĝis. Tiu verko ĝustatempe alvenas, kaj la fakto, ke ĝi aperas el neesperantista eldonejo estas bona afero, precipe ĉar ĉi-lasta estas tre konata de ĉiuj francaj gelernejanoj, kiuj ofte uzas similajn vortarojn por lerni naciajn lingvojn.


La unuaj paĝoj liveras densigitajn klarigojn pri la gramatiko de Esperanto. Poste sekvas 45 rubrikoj, en kiuj la aŭtoro listigas vortojn laŭ temoj: homa vivo, naturo, produktaĵoj, bestoj, ktp...

La temoj entenas en apartaj sencogrupoj la vortojn samsignifajn, kelkajn kun referenco al aliaj pli detalitaj temoj. Fine de ĉiu rubriko aperas tipaj frazoj kaj proverboj, bedaŭrinde ne ĉiam tradukitaj. Kelkaj tutpaĝaj fotaĵoj trafe elektitaj ilustras, same kiel la tipaj frazoj, la Esperantan vivon, kun aparta pritrakto de la kultura kaj turisma kampoj.

La verko bone respegulas la spiriton de la serio kaj ebligas la komparon kun la samspecaj libroj pri naciaj lingvoj en ĝi aperintaj. Entute utila kaj prilaborita libro, rekomendinda ankaŭ por la lernado de la franca vortaro pere de Esperanto.

Mendu ĉe UEA: 8,– gld. (por Nederlando 8,32 gld.) + sendokostoj 10%.

Aŭtentika amiko



Recenzas Pol Denoël (Belgujo):

Falsaj amikoj en Esperanto, de R. Bernard kaj A. Ribot. Marmande: Esperantaj Francaj Eldonoj, 1971. 39 p. 15 cm.

La principo de la plej granda internacieco enkondukis en Esperanton latindevenajn kaj francdevenajn elementojn, kiuj, ankaŭ pro la klareco, ne konservis saman formon, nek ĉiam identan sencon, kiel en la originala lingvo. Rezultis, ke franclingvanoj, iel favorataj de la etimologio, estas ofte en embaraso pro la nefidinda aspekto de multaj radikoj.

En tiu verketo, ankaŭ tipografie taŭga, 278 grupetoj de tiaj radikoj, similaj laŭ senco aŭ formo, ebligas racian kaj precizan lernadon de la vortaro. Krome estas aldonita valora listo de la plej utilaj transitivaj/netransitivaj verboj.

Tiu libro estas aŭtentika amiko, por ĉiuj.

Mendu ĉe UEA: 2,50 gld. (por Nederlando 2,60 gld.) + sendokostoj 10%.

Plaĉa kaj simpatia bukedo

Recenzas Povl Skårup (Danlando):

Apenaŭ bukedeto... : poemoj tradukitaj el la franca literaturo Trad. Roger Bernard. Eld.: la aŭtoro (Francujo), 1971. 47 p. Mimeo. 26 cm.

Roger Bernard estas tro modesta nomante sian tradukaron apenaŭ bukedeto. Kiel li mem substrekas en la antaŭparolo, ĝi ja ne estas antologio: li ne elektis nombron da francaj poemoj, kiuj reprezentus la tutan francan poezion, por poste traduki ilin. Sed dum pluraj jaroj li tradukis jen tiun jen alian poemon aŭ fragmenton, kiu plaĉis al li, de Corneille ĝis nuntempaj kanzonistoj, same kiel oni dum promenado en la naturo kolektas florojn ne por herbario, sed ĝuste por bukedo. Kvankam iuj el la floroj ekvelkis pro la kolektado, ekzemple la stancoj de la *Cid* de Corneille, kaj kvankam ilia vazo estas tre malluksa, multaj el la unuopaj floroj kaj ankaŭ la bukedo tuta faras impreson tre plaĉan kaj simpatian.

Mendu ĉe UEA: 5,10 gld. (por Nederlando 5,31 gld.) + sendokostoj 10%.

LASTE APERIS...

Afiŝo internacia Eld. UEA. Mendebla en du formatoj: DIN A1 (59 x 83 cm) 0,40 gld.; DIN A3 (29 x 42 cm) 0,25 gld. Minimuma mendo: 10 ekzempleroj. Kvarkolora desegnaĵo kun teksto 'Internacia Lingvo Esperanto' kaj spaco por nacilingva teksto.

Fonto de l' vivo. El la Sankta Biblio. (1949). 64p. 15cm. Represo 1971. Bibliocitaĵoj kompilitaj de G. Furhammar. Mendebla ĉe la Sveda Sekcio de KELI, Box 7, S- 690 51 Östansjö, Svedujo.

Laŭtema vortaro Esperanto-angla-franca-hispana (1972) A. Hrynkiewicz. 234p. 17cm. 10,20 gld. 6 800 vortoj en Esperanto kun paralelaj tradukoj en la tri aliaj lingvoj. La vortoj estas klasifitaj laŭ ĉ. 90 temoj kaj alfabete ordigitaj en ĉiu temsekcio.

Libro de apokrifoj Karel Čapek (1890–1938). El la ĉeĥa trad. Josef Vondroušek. 105p. 20cm. 2,70 gld. 29 novelminiaturoj kun temoj mitaj, historiaj aŭ literaturaj, ekde Prometeo kaj prahomoj, tra helenaj, romiaj, mezepokaj kaj ŝekspiraj figuroj ĝis Napoleono.

Nederlands-Esperanto-Nederlands (1971) A.J. Middelkoop. 481 p. 18cm. 5,29 gld. La plej fidinda vortaro por nederlandlingvanoj. Bazita sur *Plena Vortaro* kaj *Plena Ilustrita Vortaro*. Dudirekta, kun konciza gramatiko kaj reguloj por la vortfarado.

Neĝa lando Kawabata yasunari (1899–), Nobel-premiito. El la japana tr. Konisi gaku. 118p. 22cm. Tolbind. 14,50 gld. Serio Oriento-Okcidento, n-ro 11. Romano. Delikatsenta majstroverko pri homaj rilatoj.


Nokturno '71 Hajkista Klubo, Oosaka. 44p. 18cm. 1,20 gld. 150 originalaj hajkoj de 5 poetoj: Miyamoto masao k.a. Jam la 4a originala volumeto de tiu skolo.

Serĉado de la vivo, La (1971) Fujio Egami. El la japana tradukis Kikunobu Matuba. 167p. 19cm. 12,– gld. Popularaj priskriboj pri lastaj atingoj de biokemio, verkitaj de monde konata sciencisto. Kio estas la vivo? La origino de la vivo kaj la kosmobiologio. La sintezo de la vivo. Ktp. Ilus. per tabeloj, diagramoj.

Ĉiujn mendojn adresu al: Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj k.a. 14% pro la enlanda imposto. Al ĉiuj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj.

LA PLEJ SEKRETA LIBRO PRI ESPERANTO

Ulrich Lins



Ulrich Lins, la ĉefredaktoro de la nova, nun kompilata eldono de Enciklopedio de Esperanto, *jam akiris reputacion kiel unu el la plej konsciencaj kaj ĝisfundaj esplorantoj pri la historio kaj ideologio de la Esperanto-movado. Liaj studoj pri la hitleraj persekutoj kontraŭ Esperanto, siatempe aperintaj en* Germana Esperanto-Revuo, *estas modeloj sur tiu kampo. Loĝante nun en Japanujo por studi politikon japanan, li samtempe daŭrigas la grandan laboron super la* Enciklopedio *kaj kaptas la okazon por fari freŝajn esplorojn pri la tiea movado. En la apuda artikolo li priskribas tre interesan dokumenton, kies bildo aperas ĉi-supre. La japanlingvaj surskriboj indikas kiel eldoninton la Kriminalan Oficejon de la Justic-Ministerio kaj kiel titolon* Pri la proleta Esperanto-movado. *En aparta kadro staras la vortoj "PLEJ SEKRETA".*

Ke la Esperanta movado estis zorge observata de policaj instancoj en diversaj landoj, precipe inter la du mondmilitoj, ke tutaj Esperanto-organizaĵoj estis malpermesitaj kaj ke homoj ofte nur pro ŝatokupa apliko de la lingvo suferis persekutojn, apartenas al la plej malgajaj ĉapitroj en la historio de Esperanto. La atakoj estis des pli severaj, se oni suspektis rilatojn inter la aktiveco por Esperanto kaj kontraŭŝtata agado – kiel spertis, tamen ne nur en kapitalismaj landoj, unuavice la socialistaj esperantistoj. Samtempe eĉ plej neŭtralistaj esperantistoj kutime ne sukcesis konvinki subprememajn aŭtoritatojn, ke Esperanto estas nura lingvo kaj ke ĝi ne respondecas pri ideologioj propagandataj per ĝi; kontraŭe, diktatora reĝimo ofte ŝajnis pli bone kompreni, kia forto idea troviĝas sole malantaŭ tiu lingvo, kiun kreis la humanisto Zamenhof.

Tamen, malofte ni havis okazon rekte konsulti dokumentojn pri la Esperanto-movado, kompilitajnde persekutantoj mem. Unu notinda escepto estu ĉi tie por la unua fojo prezentita al internacia legantaro.

Unika verko

Temas pri unika verko, kiun mi antaŭ nelonge trovis en unu universitata biblioteko de Tokio. Ĝia titolo estas *Puroretaria Esuperanto undô ni tuite* (Pri la proleta Esperanto-movado), kaj ĝi estis eldonita en novembro 1939 de la Kriminala Oficejo de la japana Justic-Ministerio, kiel 69a volumo en speciala serio de Pens-esploraj Materialoj (*Siŝo kenkyû siryô*). La libro estis presita en kvantode ŝajne nur kelkdek ekzempleroj (ĉiu numerita), ampleksas 284 paĝojn kaj estas klasifikita kiel "strikte sekreta". La aŭtoro estas Takeuti zirô, tiutempe prokuroro ĉe la distrikta juĝejo de Hukuoka.

La ekzisto de tiu kredeble plej rara, sed certe plej sekreta libro pri Esperanto, ĝis nun aperinta, estis jam konata, sed laŭdire nur du-tri japanaj esperantistoj havis foje okazon vidi ĝin. Ĉar intertempe ĝi povis esti fotokopiita, la historiistoj de la japana Esperanto-movado komencis ekspluati ĝian interesan enhavon por kontroli la validon de siaj ĝisnunaj studoj.

La dokumento, kiun Takeuti estis komisiita kompili en la daŭro de nur kvar monatoj, konsistas el enket-protokoloj de arestitaj prolet-esperantistoj, larĝe citaj tra multaj paĝoj, kaj el eltiraĵoj de Esperantaj revuoj kaj verkoj de Privat, Drezen kaj Spiridoviĉ, kiujn pli frue tradukis japanen bonŝance por la prokuroro, i.a. ĝuste unu el la arestitaj, Oosima yosio (ps. Takagi hirosi).

La libro subdividiĝas laŭ la jenaj kvar ĉapitroj:

1. Signifo de la proleta Esperanto-movado
1.1. Kreiĝo de Esperanto
1.2. Materiisma lingvoteorio kaj Esperanto
1.3. Rilatoj al la latiniga movado
2. Resumo pri la internacia proleta Esperanto-movado
2.1. De la fondiĝo de SAT ĝis la skismo
2.2. Internacio de Proleta Esperantistaro (IPE)
2.3. Proleta Esperanto-Korespondado (PEK)
2.4. Internacia Asocio de Revoluciaj Esperanto-Verkistoj (IAREV)
3. La proleta Esperanto-movado en Japanujo

3.1. Estiĝo kaj evoluo
3.1.1. Antaŭ la formiĝo de Japana Prolet-Esperantista Unuiĝo (JPEU)
3.1.2. La epoko de JPEU
3.1.3. Post la detruo de JPEU
3.2. Resuma prijuĝo de la movado
4. Konkludo

En suplemento sekvas la tekstoj de la akuzo kontraŭ ĉefaj– ok – aktivuloj de JPEU, tabelo pri la stato de la procesoj, registro de pseŭdonimoj de JPEU-anoj kaj listo de mallongigoj (de ALLE ĝis UEA).

La jaroj 1930–1936


La ĉefa parto traktas la aktivecon de JPEU, t.e. precipe la jarojn 1930 ĝis 1936. La dokumento restas surprize silenta pri la antaŭhistorio de Esperanto en Japanujo (ĉe kies lulilo, en 1906/07, konkorde staris i.a. konservativa historiisto, fama verkisto, du socialistoj kaj du grafoj), kaj ĝi flankenlasas, ke la fendo inter neŭtrala kaj laborista movadoj ĝenerale ne estis en Japanujo tiel profunda kiel ekz. en pluraj eŭropaj landoj, eble ĉar dekomence la lingvo estis entuziasme utiligata por sociemancipaj celoj.

JPEU estis fondita la 18an de januaro 1931, evidente en ligo kun la granda sukceso de sesvoluma *Proleta kurso de Esperanto,* entute 1280-paĝa (cetere, represita en 1968), kies unua volumo (1930) havis eldonkvanton de 10 000 ekzempleroj.

Internacie, JPEU kunlaboris kun la SAT-opozicio, la posta IPE, kaj enlande, sub la prezido de la konata verkisto Akita uzyaku, ĝi estis, same kiel verkistoj, teatristoj, muzikistoj, fotistoj, filmistoj, sciencistoj, pedagogoj k.a., suborganizo de Federacio de Proletaj Kultur-Organizoj (KOPF). Kiel konfesas la pridemanditoj, JPEU ne estis tre sukcesa en varbado kaj lingva perfektigo de siaj membroj, unue pro la izolita situo de Japanujo kaj pro la politika severiĝo de la enlanda klimato, sed ankaŭ pro sia troa fervoro sekvi la ŝanĝiĝeman linion de la (malpermesita) Komunista Partio, Aldoniĝis la arestado de la ĉefaj funkciuloj, tiel ke JPEU fakte malaperis meze de 1934.

Nova persekuta ondo

Sed ĝian laboron neoficiale daŭrigis aliaj membroj, grupiĝante ĉirkaŭ lokaj centroj, precipe la revuo *Marŝu* en Kobe, kies redakcio, lerninte per la eraroj de JPEU, akcentis la superpartian bazon de la movado, ne postulis kvazaŭ partian disciplinon de siaj legantoj kaj akcelis lingvan ekzercadon kaj, en la kadro de PEK, internacian korespondadon. La rondo de Marŝu orientiĝis laŭ la sukcesoj de la radikala Esperanto-movado en Ĉinujo – per Esperanto japanaj kaj ĉinaj protagonistoj de la latiniga movado interŝanĝis siajn spertojn – kaj funkciis kiel japana sekcio de IPE; samtempe literatura grupo kun sia organo *Majo* prizorgis la rilatojn kun IAREV – sub la gvido de Kurisu kei, kiu havis regulan kontakton kun Miĥalski, Nekrasov, Bourguignon k.a. Sed antaŭ ol povis reliefiĝi rezultoj de tiu pli celkonforma agado, nova persekuta ondo inter decembro 1936 kaj majo 1937 definitive frakasis la maldekstran Esperanto-movadon en Japanujo.



Ulrich Lins

Tiun evoluon oni povas detale sekvi per la tute senkomente presitaj eldiroj de la koncernatoj mem. Je la fino tamen Takeuti konkludas:

"...oni povas facile kompreni, ke la proleta Esperanto-movado de nun atendas en la demokratia, neŭtralisma tendaro, kaj la latiniga movado alprenos la saman pozicion. Sed ĉe tiu la materiisma lingvoteorio ankoraŭ ne maturiĝis, kaj ĝi kritikas la troan radikalecon de la ĝisnuna proleta Esperanto-movado, volante unue fari praktikajn komencajn paŝojn. Ĉar la movado kapablas kamufli sian politikan koloron, oni devas diri pri la danĝero, ke ĝi estos de nun sufiĉe obstine adoptata de maldekstraj studentoj."

Tiu noto sendube servis al lokaj policejoj kiel instigo por atente observi ĉiujn esperantistojn. Se en la komenco preskaŭ nur prolet-esperantistoj estis arestitaj kaj kondamnitaj (pluraj mortis en malliberejo), poste multfoje okazis, ke ankaŭ liberalaj esperantistoj estis almenaŭ vokitaj al la polico aŭ ke eĉ tute nepolitikema lingvo-amanto estis arestita, ĉar li scivole aĉetis Esperantan lerno-libron en libro-brokantejo.

Sed pri tiaj malbelaĵoj Takeuti kompreneble silentis. Lia kompilaĵo legiĝas kiel valora kaj fidinda dokumentaro pri grava etapo en la historio de la japana Esperanto-movado, preskaŭ kiel memorlibro de la ĉefaktivuloj, kiu nepre meritas esti reeldonita kaj esperantigita. Kaj, kvazaŭ ĝi estus verkita de fervora esperantisto, ĝin ornamas tutpaĝa portreto de d-ro L.L. Zamenhof.

INFORMEJO



Oni demandas: Ĉar mi estas kolektanto de esperantaĵoj, mi volonte ekscius detalojn pri stelomoneroj (simile kiel pri spesmil-moneroj en *Esperanto* de aprilo 1971). Speciale interesas min la monero 25-stela.


Ni respondas: La aŭtoro de la spesmil-artikolo, s-ro A. Holzhaus, nun preparas studon ankaŭ pri la stelo-mono. Tiuj, kiuj povas aldoni informojn aŭ materialojn por ĝi, povas sendi ilin pere de la redakcio al s-ro Holzhaus. Intertempe, ni aperigas ĉi-apude bildojn en 100%-a grandeco de ĉiuj ekzistantaj stelo-moneroj.

esplorado en la se

Por industrio, la decido servi al la homaro signifas: esplori.
La okdekjara historio de la Philips-kompanio atestas pri evoluo per esplorado daŭre fosanta pli profunden por trovi la faktojn.
Ofte ŝajnis kvazaŭ oni serĉas pinglon en fojnostako. Necesis pacienco, mono, talento, energio. Sed, dank'al ili, brilaj rezultoj estas akiritaj.
Apogata de fundamenta esplorado, Philips povas servi kaj helpi la milionojn, kiuj fidele plenumas sian taskon en la mikrokosmo de familio, oficejo, laboratorio aŭ industrio.
Per mastrumaj helpiloj en la domo. Per X-radiaj kaj medicinaj aparatoj por hospitaloj. Elektroniko por la industrio. Pesticidoj por la agrikulturo. Lumigado por transportiloj. Oficejaj maŝinoj. Kie ajn homoj deziras fari servojn al aliaj, ili trovas Philips ĉe sia flanko, preta kaj kapabla provizi ilin per la iloj por servi.

Esperantlingva katalogo priskribanta la modernan programon de Philips en X- radiaj kaj medicinaj aparatoj estos baldaŭ havebla. (Philips Medical Systems Division, Eindhoven - Holland)

Elektroniko helpas konstrui mondon pli feliĉan kaj pli sanan.



La "EVOLUON" en Eindhoven, Nederlando, estas konstanta ekspozicio, kiu montras la disvolviĝon de scienco kaj socio. Ĝi estis konstruita por memorigi la 75-an datrevenon de la fondiĝo de Philips.

Cyo de l'homaro

PHILIPS

PERSONE


Jonas

• La prezidanto de Aŭstrujo Franz Jonas, okaze de sia oficiala vizito al Romo en novembro 1971, renkontis lokajn esperantistojn kaj familiare konversaciis kun ili. Delegacio de 10 personoj el Itala Esperanto-Federacio estis invitita al la oficiala akcepto, per kiu s-ro Jonas reciprokis la vespermanĝon al li proponitan de la itala prezidanto Saragat.

Pettyn

• La konata verkinto de pluraj popularaj lernolibroj de Esperanto kaj de la disko-kurso "Ĉu vi parolas Esperante?", s-ro Andrzej Pettyn el Pollando, instruos Esperanton en la universitato Fort Lauderdale, Florida, Usono, en 1972. Li antaŭe jam instruis la lingvon eksterlande en somera universitato en Finnlando k.a. lokoj.

ESPERANTO-INTERPRETISTOJ oficiale nomitaj por la ĉi-jara Vintra Olimpiado pozas en Sapporo, Japanujo. La brustinsigno, kiun portas ĉiu interpretisto, indikas la respektivan lingvon. Sin anoncis entute 2 334 volontuloj kiel sensalajraj interpretistoj okaze de la Olimpiado: por la lingvoj (en ordo laŭnombra) angla, franca, germana, rusa, hispana, ĉina, Esperanta kaj itala. Kvankam kelkfoje la organizantoj de Mondekspozicioj nomis oficiale interpretistojn por Esperanto, ŝajnas la unua fojo, ke tio okazas ĉe Olimpiado.



LOKE

Belgujo

• Internacia Esperanto-Kongreso Antverpeno 1972, kiu inkludas la 54an Belgan Kongreson, la 10an Markolan Kongreson kaj Trilandan Renkontiĝon (vd. *Esperanto*, 1971, p. 207 sub "Eŭropo"), estas organizata sub aŭspicioj de la Belga Ministerio pri Nederlanda Kulturo kaj de la Ligo de Flandraj Kulturorganizaĵoj. La Ministerio helpas la organizadon ankaŭ finance.

Bengallando

• Laŭ raporto de hinda gazetagentejo, la kabineto de la nova ŝtato Bengallando decidis, ke la bengala estu la oficiala lingvo de la ŝtato. Laŭ la konstitucio de Pakistano, la oficialaj lingvoj de Pakistano estis la urdua kaj bengala, kun paralela uzo de la angla lingvo ĝis 1972. En la praktiko, la nova decido signifas, ke la forigo de la angla lingvo, ekzemple sur ŝoseaj indikiloj, por aŭtomobil-numeroj ktp., plirapidiĝos.

Brazilo

• La departemento pri edukado kaj kulturo en la urbo Rio Largo realigis intensan kurson de Esperanto. Gvidas ĝin la urbestro mem, d-ro Ezequias Alves.

• En la urbo Belém do Pará oni ŝanĝis la nomon de la strato N.S. de Fatima al "Strato Esperanto". En la Federacia Universitato de Pará, Esperanto fariĝis elektebla studobjekto per la rezolucio de la Supera Konsilantaro pri Instruado (1971-08-09, n-ro 32, artikolo 2).

Britujo

• Enketo farita de la Universitato de Manchester montras, ke proksimume 20% de la eksterlandaj studentoj en britaj universitatoj spertas lingvajn malfacilaĵojn. Okazas, ke studentoj, kiuj laŭdire "bone scias" la anglan lingvon, simple ne komprenas la anglalingvajn prelegojn.

Bulgarujo

• La plej disvastigita landa gazeto *Raborničesko delo* (650 mil ekz-oj) publikigis informon pri la kunveno de esperantistoj en Sofio, okazinta omaĝe al la Unesko-jubileo en novembro 1971. En pluraj aliaj lokoj okazis similaj aranĝoj.

Ĉinujo

• Laŭ raporto de la brita radio, ĉina aŭtoritatulo deklaris, ke la nombro de ĵurnalistoj, kiuj akompanos prezidanton Nixon okaze de lia baldaŭa vizito al Pekino, estos limigita "pro manko de interpretistoj".

Japanujo

• Dum 4 tagoj en aŭgusto 1971 okazis en Oosaka "Ĉe-arbara Esperanto-Lernejo" kiun ĉeestis 112 personoj, plejparte junaj. S-ro U. Lins el F.R. Germanujo estis unu el la gvidantoj.

Jugoslavio

• Okaze de sia 50-jara jubileo, Esperanto-Societo Novi-Sad okazigos ekspozicion kaj eldonos memorlibreton krom solene festi en la 30a de aprilo 1972. La Societo invitas ĉiujn interesitojn.

Kolombio

• Helpe de reklamo de komerca entrepreno, Esperanta Dialoga Asocio en Medellín eldonis en 5 000 ekzempleroj 4-paĝan faldfolion por informi pri la Internacia Lingvo kaj pri la koresponda kurso nove starigita en Kolombio.

Kubo

• Dank' al la agado de la Esperanto-Komisiono kaj de la Peranto de UEA, aperas ĉiam pli da informoj pri Esperanto antaŭ la publiko. Laste aperis artikoloj en la revuo *Bohemia* kaj teknika revuo *Normalización y Metrología*. Loka radio-stacio *Radio Surco* en Ciego de Avila elsendis raporton "Kio estas Esperanto?" la 30an de novembro 1971. Pliaj elsendoj sekvos.

— PERSONE

Rumanujo

• La estraro de la universitato en Krajovo eldonis Esperanto-lernolibron verkitan de s-ro Jozefo Petrin, prezidanto de Rumana Kunordiga Esperanto-Komitato. En la sama universitato okazas Esperanto-kurso, al kiu partoprenas 63 studentoj, sub gvido de s-ro Petro Fetoju.



'POR PLI BONA MONDO' estis la temo de la Zamenhof-festo en San Francisco, la 12an de decembro, 1971. Charles Thrower, spertulo pri la historio de negroj en Usono, festparolis. Apude: s-ino Thrower.

Sovetunio

• Komence de novembro 1971 la televida stacio de Zaporoĵje (Ukrajna SSR) prezentis plurfoje programon kun honorigo al la Esperanto-sekcio en la Pedagogia Instituto, kiu organizis "Vesperon de Amikeco".

Unuiĝinta Araba Respubliko

• Unuafoje en U.A.R. elsendis loka radiostacio intervjuon pri Esperanto, kun d-ro Nassif Isaac kaj s-ro Ahmed A. Ĥadr, en novembro 1971.

Usono

• La nova ilustrita informbroŝuro *The ABC's of Esperanto*, produktita de konata eduka eldonejo Channing Bete, estas tre favore akceptita en kaj ekster la movado. ELNA tuj aĉetis 5 000 ekzemplerojn, kaj la eldonisto mem distribuis 555 ekzemplerojn al la prezidanto, senatanoj kaj parlamentanoj de Usono, kun speciala alvoko.

• Du kursojn pri Esperanto gvidos dum 1972 prof. Nathan Süsskind en la fako de ĝermanaj kaj slavaj lingvoj en la "Kolegio de la Urbo Nov-Jorko" (kun 33 000 studentoj), parto de la "Urba Universitato de Nov-Jorko". La kursoj donos al sukcesaj partoprenintoj kreditpoentojn laŭ la kutima usona sistemo. Ili pritraktos ankaŭ la projekton *Interlingua*.

Vjetnamujo

• Okaze de la Zamenhof-datreveno en decembro kolektiĝis en templo en Sajgono proksimume 30 esperantistoj. Partoprenis la kunvenon ankaŭ franca aktivulo Francisko Simonnet, kiu nun estas profesoro de la franca lingvo en la Universitato de Sajgono kaj gvidas mezgradan Esperanto-kurson kun s-ro Nguyen-phuoc Kháng.

FAKE

Astrologio

• En la 10a internacia kongreso de UARKA (= Universala Akademio de la Regado Kosma kaj Astrologia) en oktobro troviĝis inter 35 prelegoj unu prelego pri Esperanto, kio kaŭzis interesiĝon de la ĉeestintoj tiel, ke multaj el ili aĉetis lernolibron.

Aŭtomobilistoj

• Ekde januaro 1972, Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista havas sian sidejon en la kadro de nove starigita "Esperanto-Centro" (Corso Francia 4, I-10138 Torino), sub moderna portiko en komerca kvartalo. Al tiu adreso povos sin turni la esperantistoj, kiuj intencas aliĝi, kaj la aŭto-teknikistoj, kiuj deziras subteni la agadon de la klubo kaj kunlabori en la terminologia kampo.

Diplomatio

• La franca lingvo, kiun la nova ĝenerala sekretario de UN parolas flue, certe helpis al lia elektiĝo. La franca registaro insiste postulis, ke la ĝenerala sekretario parolu tiun lingvon. La finna kandidato Max Jakobsen, kiu ne estis elektita, ne tre flue parolas france.

Oceanografio

• D-ro Ralph A. Lewin, oceanografia profesoro de la Universitato de Kalifornio, dum sia restado en Japanujo en aŭgusto 1971 utiligis Esperanton en oficialaj prelegoj kaj diskutoj inter japanaj oceanografiistoj de guberniaj instancoj, kun akompano de interpretado.

Religio

• Nun ankaŭ en Brazilo anoj de la japan-devena religio Mondo-Mesianismo, kies japanaj adeptoj fondis Mondo-Mesianisman Esperanto-Asocion, komencis instrui Esperanton: per gazetkurso en revuo *Gloro* kaj per buŝaj kursoj en Rio de Janeiro.

Sennaciismo

• La 27a kongreso de SAT-Amikaro okazos en Narbonne (Francujo) de la 1a ĝis la 4a de aprilo 1972. Informojn oni petu de: SAT-Amikaro, 67 Bd Gambetta, F-75-Paris (20e).

• La 45a Kongreso de SAT okazos de la 22a ĝis la 29a de julio 1972 en Kuopio (Finnlando). Informoj peteblaj ĉe "Lingvoponto", Pf. 119, SF-70101 Kuopio, Finnlando.

Troa uzo de mallongigoj

Skribas Edo Taddei (Italujo):

Troa uzo de signoj kaj mallongigoj ĝenas facilan komprenon. En la revuo "Esperanto" precipe, oni ofte faras mallongigojn. Oni povas kompreni la uzon de "UEA", "TEJO" kaj aliaj ofte uzataj mallongigoj, sed oni ne devas tromultigi. Oni renkontas frazojn kiel tia: "La KKS kaj la LKK de la 56a UK" kune kun ILEI, CED, IJK, PIV ktp. Tio ne estas Esperanto,sed kvazaŭ stenografio!

Oni povus aserti, ke tion postulas spacaj necesoj, sed la plilongiĝo de la teksto sen mallongigoj estas relative malmulta.

Utiligi korespondaĵojn

Skribas Nik. Nikolov (Sofio):

Ĉiutage mi ricevas po kelkaj korespondaĵoj el diversaj landoj. Preskaŭ duono el ili ne havas ian indikon sur la koverto pri Esperanto. Simple la sendintoj forgesas fari la plej facilan kaj nemultekostan informadon pri nia lingvo, uzante glumarkon pri ĝi. Se oni ne posedas tiajn informilojn, oni povas simple skribi sur konvena loko de la koverto: "Esperanto – Lingvo Internacia".

La korespondaĵoj survoje estas prizorgataj de multaj poŝtistoj kaj krome, en pluraj kazoj, rigardataj de aliaj personoj. Se ili ofte vidos la vorton Esperanto, ili konvinkiĝos, ke la komuna lingvo estas sufiĉe vaste aplikata.

Reformi la delegitan liston

Skribas David K. Jordan (Usono):

Mi kun intereso legis la leteron de Brian Kaneen (Kanado) pri la delegita listo por Usono en *Esperanto* de decembro 1971. Kaneen pravas pri la malfacileco de la nuna ordigo. La redakcio ankaŭ pravas pri la problemo de precedenco. Sed rimarku, ke Kaneen parolas pri "grandaj landoj" kiel Usono, Ĉinujo, Sovetunio, Brazilo ktp., ne pri malgrandaj landoj kiel Belgujo. En grandaj landoj oni povas vojaĝi dum kelkaj tagoj en la sama provinco, sed malgrandajn landojn oni travojaĝas sen atento pri la provinco-nivela organizo. Kial ne decidi, ke oni utiligu provinc-(aŭ ŝtat-)nomojn nur por landoj *kaj* grandaj *kaj* enhavantaj delegitojn en pli ol difinita nombro da urboj?

Subteninda — la ideo pri Vojaĝ-informa Servo

Skribas A. Frangeul (Francujo):

Mi plene subtenas la ideojn, kiujn esprimis s-ro Bagger en "Esperanto" de decembro 1971.

Mi insiste petas la Estraron de UEA studi tiun proponon de katalogo pri renkontoj, feriokursoj ktp., kiu estus sendita regule al ĉiuj individuaj membroj de UEA. Necese, nia movado bezonas iri laŭ la fluo de la evoluo.

Same, la ideo de s-ro Nikolov (en la sama paĝo) estas bonega (temas pri eldono de frazaroj dulingvaj). Tio estus utila ĉefe en la landoj, kies lingvoj ne estas lernataj eksterlande.

Skribas August Weide (F. R. Germanujo):

Se iel eble, oni realigu la proponon de P.V.Bagger en la decembra numero. Financu ĝin laŭ lia ideo!

Esperanto en radio

BRAZILO. Radio Clube de Sorocaba, per ondoj 278 m (1080 kcs), regule disaŭdigas ĉiun dimanĉan-lundan nokton sub la titolo "Sintezo de Esperanto, Lingvo Internacia" unu horon da esperantlingva programo; tio okazas, laŭ meza tempo Greenwich, de noktomezo ĝis 01.00. La programo komenciĝis en la jaro 1965 kaj estas gvidata de s-ro Manoel Blaz Garcia. Ĝi konsistas el informoj, notoj pri la Esperanto-movado tra la mondo, muziko, kurso ktp. kaj estas grava helpo al diskonigo de Esperanto inter la lokaj gejunuloj.

POLA RADIO. Okaze de la 500-a naskiĝdatreveno de Nikolao Kopernik, kiun en 1973 solenos la tuta mondo, ĉiuj aŭskultantoj de Pola Radio estas invitataj partopreni konkurson. La respondo al almenaŭ unu demando donas eblon de lotumgajno de premio. La ĉefa premio estas 10-taga rondvojaĝo tra Pollando. Respondoj devas esti sendataj antaŭ la 15a de marto. Petu pliajn informojn de Pola Radio, Skrytka 46, Warszawa 1, Pollando.

Informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75-Paris 16, Francujo. Por aliaj detaloj vidu la januaran numeron.





La aŭtoro E. V. Tvarožek
(Ĉeĥoslovakujo)

BELARTAJ KONKURSOJ 1971
Originala poezio: 2a premio

La vento estas mia amiko
kaj mi lin ŝatas
la ĉiam kantetantan vagabondon
la fraton de ĉiuj vagabondoj
rapidantan ĉiam al nevideblaj celoj
amanton de la foraj mondoj
pelantan ŝipojn kun plenblovitaj veloj
sur altleviĝantaj ondoj
plenaj de la revoj de mia infanaĝo
(kaj ankaŭ de la nunaj, sed tion
konfesi mankas la kuraĝo...)

Mi ŝatas la venton kiam li
susuras en densaj foliaroj
kaj petolanta kiel aro da kaprinoj
kombas la harojn de junaj knabinoj
kaj levetas iliajn jupojn
kaj faras la mondon pli ĉarma
kaj igas — malgraŭ miaj progresintaj jaroj —
mian sangon pli vigla kaj varma

Mi ŝatas la venton
kiam li per nuboj
per ĉi fabele mola materio
la ĉielon plena pentras —
kiel la murojn per kreto strataj buboj —
desegnas sur ĝin tion kaj jenon
kio forgesigas la ĉiutagan penon
kaj flugilojn donas
al mia velkanta fantazio

Mi ŝatas la venton
kiam revenante el la foroj
li sur flugiloj siaj
alportas el spacoj iluziaj
faskon da bonodoroj
kaj kantoj dolĉe melodiaj

Kaj mi ŝatas lin tre
ankaŭ kiam vintre
li kaŝas ĉion belan kaj aĉan
sub la virga blanko
de la nube mola neĝo
kaj kiam li
— majstro-skulptisto kaj vagabondo —
aspektojn novajn viditajn en la mondo
donas al ĉio ĉirkaŭ ni
figurojn faras el la apudvoja heĝo
kaj ĉion kovras per ornamoj
dolĉformaj kiel junknabinaj mamoj

Mi lin ŝatas ankaŭ tiam
kaj tute ne ribelas
kiam sur kampoj kaj stratoj
li kune kun siaj ventoj-fratoj
la polvon kirle pelas
kaj ĝin ĵetas en mian vizaĝon
devigante min okulojn miajn fermi
Eĉ por tio mi dankas al la vento
kaj admiras lian grandan saĝon
(ĉar por vidi la mondon pli bone
oni devas iam fermi la okulojn
por momento)

Mi ŝatas la venton eĉ tiam
kiam li kun duonfrato
sia la pluvo multspeca
kompletiganta lin harmonie
min renkontas ie —
ne gravas ĉu sur la strato
irantan el drinkej' hejmeca
aŭ ĉu ili faras al mi la honoron
kaj venas min viziti
kiam mi hejme estas

La fenestron tiam
mi malfermas al ili
kaj ankaŭ mian koron
kaj tiel amikecon mian
al ili ĝoje manifestas

Mi ŝatas la venton
kiam ĉio minacas eksplodi
kaj oni ne plu kredas sin kapabla
vivi la vivon krude malfacilan
tiam li venas kaj per spiro afabla
malvarmigas mian kapon febran
kvietige frunton mian kisas
kaj forpelas zorgon la tenebran
kaj helpas al mi kiam
de la vivo sur maston la gracilan
la flagon de l'obstino mi hisas —
de l'obstino plu vivi kaj klopodi
spite al ĉio
spite al ĉiu

Mi ŝatas vin amiko mia vento
amanto de la mondo
de vastaj maroj kaj serenaj steloj
senlace kuranta al ĉiam novaj celoj
(kiel mi en miaj sentoj)
pelata de nekonata tento
vi mia frato vagabondo

Saluton frato vento!

Saluton fratoj ventoj!

© E. V. Tvarožek, 1971



TEJO

TEJO-redaktoro
G. D. Winkler,
Jaegerstr. 27,
D-42-Oberhausen-Sterkrade,
F. R. Germanujo

ESPERANTO – NOVA LINGVO POR LA HIPIOJ?

Por vastigi Esperanton oni ĉiam serĉas grupojn, kiuj bezonas la Internacian Lingvon; unu el tiaj estas la hipioj; ili krome havas du avantaĝojn: ili ne estas konservativaj kaj ili havas tempon por lernì.

Kiel interesi ilin pri Esperanto? Unue la hipioj devas aŭdi ofte pri la Internacia Lingvo, kaj due ili devas havi facilan eblecon por lerni ĝin; tial naskiĝis la sekvonta plano: Kunpreni aŭtohaltigantojn en la aŭtomobiloj kaj paroli kun ili pri la lingvo-problemo en diversaj landoj kaj Esperanto; poste doni al ili bazajn lernilojn kaj informmaterialon; – la ĝisnunaj spertoj tiurilataj estis nur pozitivaj.

La dua parto de la plano estas, ke kelkaj esperantistoj veturu al Amsterdamo kiel unu centro de la hipia movado, vivu inter ili, disdonu senpagajn informan kaj lernigan materialojn kaj instruu al la interesitoj Esperanton. Dek junaj geesperantistoj jam volontas veturi al Amsterdamo, kaj por lernomaterialo jam kolektiĝis tricent francaj frankoj inter la "SATanoj de Parizo", sed tio ne sufiĉas; se la kampanjo estu sukcesa, necesas ankoraŭ pli da partoprenantoj, materialo kaj mono.

Interesitoj turnu sin aŭ al f-ino Inge Kooy, Franselaan 270b, NL-3007 Rotterdam, Nederlando, aŭ al s-ro Eckhard Woite, D-6101 Rossdorf, F.R.Germanujo, Jugendhof.

HISPANAJ NOVAĴOJ

La 24-a Internacia Junulara Kongreso en 1968 okazis en Taragono en Hispanujo; post tiu aranĝo bedaŭrinde ne venis multaj novaĵoj pri Esperanto-junularo el tiu konata lando.

Sed komence de la jaro 1971 iel sanĝiĝis la situacio: "HEJS translokiĝis al Bilbao", tio signifas, ke aktivega loka grupo de Bilbao transprenis gvidadon de la hispana Esperanto-junularo; tuj oni kontaktis la diversajn grupojn por peti sugestojn kaj proponojn pri aktiva kunlaboro; okaze de la nacia kongreso en Alicante estis unua grava kunveno, kaj dum speciala "junulara tago" kun multaj junularaj programeroj kaj diskutoj por ĉiuj estis ebleco konatiĝi kun aliaj gejunuloj; partoprenis ankaŭ multaj novaj esperantistoj, kies lingva scipovo ankoraŭ ne estis tiel bona, sed (tio plej multe gravas): ĉiuj sekvis komunan veran idealon esperantisman kaj vivis en frateca kaj amika etoso, ĉiuj kune, sen iaj apartaj grupoj!

Precipe la nova estraro klopodis instigi ĉiujn esti veraj aktivaj esperantistoj kaj ne iaj pasivaj homoj, kiuj simple nur parolas Esperante; elektiĝis provincaj reprezentantoj por certigi pli bonan tutlandan informadon pri junularaj Esperanto-okazintaĵoj.

Krome daŭre kaj regule eldoniĝas dumonata revuo, kiu estas organo de HEJS; tiu ĉi revuo, kiu cetere estas tute en Esperanto, intencas esprimi la diversajn opiniojn kaj ideojn de la membroj, ne nur pri Esperanto, sed ankaŭ pri ia ajn temo. Tiel estas invitataj kaj kore bonvenigataj ĉiuj, kiuj deziras kunlabori.

Menciindas ankoraŭ aliaj aktivecoj de HEJS: okaze de la Zamenhof-festo kelkaj anoj de Bilbao'a grupo ludis teatraĵon en la Internacia Lingvo, originalan verkon de malnova Bilbao'a esperantisto. Kvankam la junaj geaktoroj estas nur amatoroj, ili tre entuziasme laboris kaj havis grandan sukceson; post prezentado antaŭ pluraj junularaj grupoj nun alceliĝas prezenti ĝin ankaŭ dum la ĉijara nacia kongreso en Vigo, provinco Galicio.

Aliaj projektoj estas aranĝi bildkartan, fotografian kaj poŝtmarkan ekspoziciojn por ĉi tiu jaro; unue ili okazos en Bilbao, kaj poste ili vojaĝos tra ĉiuj hispanaj junularaj Esperanto-grupoj.

Tiajn rimarkindajn kaj gravajn pozitivajn sanĝojn ni ĉefe ŝuldas al laboremo de la vere aktiva nuna estraro de HEJS, antaŭ ĉio precipe al ĝia prezidanto, s-ro José Fariñas kaj f-ino Maria José Moran.

Tiu, kiu interesiĝas pri kunlaboro aŭ pli detala informo, turnu sin rekte al HEJS, Barrecalle Barrena, 7, 1.a, Bilbao-5, Hispanujo.

NOVA TEJO-SEKCIO EL G.D.R. SIN PREZENTAS

Invito al internacia post-IJK-a tendaro. Ĝi okazos tuj post la 28a IJK (en Toruń, Pollando), kaj do estos bonega refreŝigaĵo post streĉa kongreslaboro; krom tio ankaŭ la loko estas favora: atingebla de Toruń en ok horoj!

La loko estos la urbo Karl-Marx-Stadt, kaj la datoj estas de la 24a de julio ĝis la 1a de aŭgusto 1972.

La programo krom prelegoj, referaĵoj kaj grupaj diskutoj i.a. entenas renkontiĝojn kun loka junularo, urboviziton kaj migradon tra arbaroj; la loĝado okazos en plene kaj komforte ekipitaj kvarpersonaj tendoj; la tendumejo situas meze en arbaro, sed tamen proksime al urbo; tuj apude estas i.a. kastelo kaj kvar drinkejoj! Krome post la aranĝo estos ebleco viziti la faman urbon Dresden.

Se interesus vin partopreni tian aranĝon aŭ havi kromajn informojn pri ĝi, tuj skribu al: Esperanto-Klubo, DDR-90 Karl-Marx-Stadt, p.f. 551.

28-A I.J.K. DE TEJO OKAZOS EN POLLANDO

La 28a Internacia Junulara Kongreso de TEJO, laŭ invito de Pola Esperanto-Junularo okazos de la 17a ĝis la 23a de julio 1972 en Toruń; la temo estos "La junularo kaj la tria mondo". Pli detala raporto sekvos.

Redaktoro: E.L.M. Wensing
Postbus 72, Valkenswaard NB, Nederlando

IOM PRI LA VERBOJ EN ESPERANTO

Estus facile plenigi plurajn paĝojn por detale pritrakti la uzadon de la verboj en Esperanto. Hodiaŭ ni parolos pri nur unu aspekto de la Esperantaj verboj, aspekto tre grava, ĉar ĝi ne ekzistas en multaj naciaj lingvoj. Temas pri verboj transitivaj kaj verboj netransitivaj.

La granda plimulto de la verboj esprimas AGON. Kiam la ago, esprimita de la verbo, transiras (aŭ povas transiri) al alia persono aŭ afero, oni nomas la verbon TRANSITIVA (ekz-e: La patro punas sian filon). Sed, kiam la ago, kiun esprimas la verbo, NE transiras (aŭ ne povas transiri) al alia persono aŭ afero, la koncerna verbo estas NETRANSITIVA (ekz-e: Mi pensas, ridas, dormas, miras — la domo brulas — la malbona vetero daŭras, ktp.).

EN ESPERANTO, LA SAMA VERBO NE POVAS ESTI SAMTEMPE TRANSITIVA KAJ NETRANSITIVA.

El transitiva verbo (ekz-e: fini) oni povas fari netransitivan verbon helpe de la sufikso 'iĝ' (finiĝi). Kaj por transitivigi netransitivan verbon (ekz-e: bruli), oni plej ofte uzas la sufikson 'ig' (bruligi), sed multfoje ankaŭ prepozicion,(pensi-pripensi, plori-priplori, pensi-elpensi). Tial, por korekte paroli en Esperanto, oni devas scii, ĉu verbo estas transitiva aŭ netransitiva. Jen kelkaj studintaj frazetoj:

Transitivaj verboj	**Netransitivaj verboj (helpe de 'iĝ')**
La knabo rulas la pilkon	La pilko ruliĝas sur la planko
Oni komencas la laboron je la oka	La laboro komenciĝas je la oka (horo)
Li levis la manon	La suno leviĝas en Oriento
La kamparanino paŝtis la bovinojn	La bovinoj paŝtiĝis
Netransitivaj verboj	**Transitivaj verboj (helpe de 'ig')**
La aŭto haltis antaŭ la urbodomo	La doganisto haltigis ĉiujn aŭtojn
La pluvo ĉesas (Ĉesas pluvi)	La vento ĉesigis la pluvon
La kurso daŭras ankoraŭ	Post unu monato oni daŭrigos la kurson
La pentraĵo pendas sur la muro	Pendigu ĝin iom pli dekstren
Mia libertempo pasas tro rapide	Kie vi pasigis vian libertempon?
Multaj homoj suferas pro malsato	Lia miskonduto suferigis ŝin.
Ĉu vi sidas komforte?	Sidigu la etulon sur la seĝon.
Li dormis kiel leporo	La monotona zumado (en)dormigis min

Oni lernigis al vi, ke la gramatikaj reguloj de Esperanto estas sen-esceptaj. Tamen, jen sekvas unu escepto je la ĉi-supre klarigita regulo. Oni diras, eĉ en Esperanto, 'mi fumas pipon' (transitiva) kaj 'la pipo fumas' (netransitiva). Ĉu eble d-ro Zamenhof faris tion por pruvi la verecon de la proverbo "Ne ekzistas regulo sen escepto"?

PLEONASMOJ

Instruisto iam demandis en la klaso: "Kiu el vi povas difini la vorton 'pleonasmo'? " Respondis knabo "Blankhaŭta svedo" kaj tuj vokis alia "Nigra negro". La du ekzemploj estis bonaj, eĉ trafaj, sed ili ne estis respondoj al la farita demando pri difino.

Plena ilustrita vortaro diras, ke 'pleonasmo' estas la superflua uzo de vorto(j), kiu(j) estas senutila(j) por la signifo. Kelkfoje pleonasmoj povas esti utilaj por pli klare aŭ pli emfaze esprimi ion (ekz-e: Mi vidis tion *per miaj propraj okuloj*), sed ofte ili esprimas *duoble* la saman ideon. Pleonasmaj esprimoj, en parolo kaj skribo, estas tiel oftaj, ke ĝenerale oni tute ne rimarkas ilin. Tamen, se vi volas akiri fluan kaj klaran stilon, klopodu laŭeble eviti ilin.

Jen sekvas kelkaj esprimoj kaj frazetoj (grandparte ĉerpitaj el revuoj kaj gazetoj), enhavantaj pleonasmajn vortojn, kursive presitajn:

Ni importas maŝinojn *el eksterlando* kaj eksportas fruktojn *al eksterlando.*

Li kuŝis *horizontale* sur la dorso kaj baniĝis en la suno.

Antaŭe mi avertis lin, ke tio povos okazi.

La du ludantoj *reciproke* influis unu la alian.

Daŭre li faras *novajn* inventojn.

Kun ĝojo ni anoncas la naskiĝon de nia *nova* filineto.

La plej aĝa skabeno solene enoficigis la *novan* urbestron.

Pasintjare mi faris *eksterlandan* vojaĝon al Sudameriko.

Juna knabino de 17 jaroj renkontis *maljunan* sinjoron de 80 jaroj.

Dum sia vivo li estis fervora batalanto por la paco.

Bonvolu ripeti vian viziton *en la estonteco.*

Oni promociis lin *al pli alta posteno.*

KALENDARO



Februaro

6-19	Int. vintra universitato, Zakopane, Pollando
12-19	E-skisemajno, Werfenweng-Salzburg, Aŭstru.
20-26	Semajno de Internacia Amikeco

Marto

11	Esp-ista renkontiĝo, Leipzig, G.D.R.
11-12	Ĝen. kunveno de Svisa E-Societo, Gwatt
26-2/4	Studsemajno, Grésillon, Francujo
31	Limdato de la belartaj konkursoj
31	Kotizoj de Universala Kongreso altiĝas
31-4/4	64a franca kongreso, Nantes

Aprilo

3-9	Kultursemajno, junularrenkontiĝo, Grésillon
14	Zamenhof mortis en 1917
29	Limdato de Internacia Ekzameno
29-1/5	54a belga kong., 10a markola kong., trilanda kong., Antverpeno, Belgujo

Majo

6-7	Dana jarkongreso, Silkeborg
6-12	Int. fervojista kong., Lugano, Svislando
11-14	Ornitologa renkontiĝo, insulo Texel, Ned.
13	Nederlanda jarkunveno (LEEN), Zaandam
13-14	Kultura semajnfino, Renens, Svislando
19-22	50a germana kong., Braunschweig, F.R.G.
20-22	Sveda kongreso, Västerås
26-29	56a brita kongreso, Brighton

Junio

17	Limdato por aliĝo al Universala Kongreso

Julio

2-23	Kulturaj semajnoj, infana internacia renkontiĝo, Grésillon, Francujo
9-15	10a somera E-universitato, Gyula, Hung.
15-16	59a japana kongreso, Takamatu
15-31	2a int. labortendaro, Roccasecca, Italujo
17-23	28a Int. Junulara Kong., Toruń, Pollando
17-23	Hungara kultura festivalo, Budapest, Hung.
20-23	7a brazila seminario, Curitiba
22-28	Sennaciista kongreso, Kuopio, Finnlando
23-30	Int. feriaj E-kursoj, Helsingör, Danlando
23-6/8	Internacia dusemajna periodo, Grésillon
24-1/8	Int. tendumado, Toruń, Pollando
24-26	14a kanada kongreso, Victoria
26-2/8	25a int. kristana kong., Melun, Francujo
29-5/8	57a Universala Kong., Portland(Oregon), Us.
30-6/8	Sveda somera semajno, Frostavallen, Sved.
30-27/8	Someraj universitataj kursoj, Lieĝo, Belg.

Aŭgusto

6-13	Oficiala Postkongreso, San Francisco, Uso.
6-27	Studsemajnoj, Grésillon, Francujo
19-31	40a int. blindula kong., Rimini, Italujo
27-10/9	Kulturo kaj ripozo, Grésillon, Francujo

Septembro

30-7/10	5a pupteatra int. festivalo, Zagreb, Jug.



HUNGARA KULTUR-FESTIVALO

sub aŭspicio de UEA 17-23 julio 1972

Post la Universala Kongreso en 1966 en Budapeŝto, kiam kolektiĝis 3975 kongresanoj, jam pasis pli ol 5 jaroj. En la sama urbo okazos ĉi-jare Hungara Kultur-Festivalo sub aŭspicio de UEA.

La hungara kulturo — ĝiaj literaturo, muziko, folkloro ktp. — estos laŭeble plej abunde prezentita dum la semajno. La organizantoj jam enprogramigis allogajn erojn: interalie koncertojn, ĥorojn, filmoprezentadojn, ekskursojn, vizitojn al belaj regionoj. Ne nur prezenti la hungaran kulturon, sed ankaŭ ebligi internacian amikan renkontiĝon kaj doni okazon por fakaj kunvenoj — tion deziras la organizantoj. (Fakaj organizaĵoj, kiuj volas kunveni tie, bonvolu rekte kontakti kun ili).

Por tiuj, kiuj deziras pasigi pli ol unu semajnon en Hungarujo, estas antaŭ kaj post la Festivalo du aliaj aranĝoj: respektive, la 10a Jubilea Sesio de Somera Esperanto-Universitato (10-16 julio, Gyula) kaj la 5a Internacia Renkontiĝo de Esperantistoj-Naturamikoj (24 julio - 2 aŭgusto, Abaliget).

Aliĝiloj peteblaj ĉe: Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto 5, Pf. 193, Hungarujo.

OFICIALA INFORMILO

N-ro 453, 1 januaro 1972

MEMBRO-STATISTIKO 1971

Jen la stato de la membraro je la fino de decembro 1971 kaj por kompari ankaŭ kun tiu je la fino de decembro 1970.

	1970	1971
Asociaj membroj:	26 045	24 555
Individuaj membroj:		
MJ	833	804
MA	4 519	4 715
MS	254	246
DM, D. Pat.	828	843
HM, H. Prez.	25	19
J-MJ	64	68
J-MA	165	147
MA-K	144	157
	6 832	6 999
Membroj entute:	32 877	31 554
Simplaj abonoj:	116	102
Pagintoj entute:	32 993	31 656

INTERNACIA EKZAMENO

La Internacia Ekzamena Komisiono (IEK) denove ekzamenos kandidatojn en Portland (Oregon), Usono, okaze de la Universala Kongreso. Povas esti allasita nur persono, kiu sukcese finis per diplomiĝo minimume mezgradan lernejon kaj kiu plene posedas la Internacian Lingvon. Ĉiu, kiu deziras kandidatiĝi, bonvolu sendi laŭeble plej frue (limdato: la 29a de aprilo) al la sekretario de la IEK (d-ro J. C. Wells, 17 Ashbourne Terrace, London S.W.19, Britujo): esperantlingvan tradukon de la diplomo pruvanta, ke la kandidato finis mezlernejon (la ĝusteco de la traduko devas esti konfirmita de kompetenta instanco) kaj ateston pri sukcese plenumita supera ekzameno de Esperanto en sia lando, aŭ alian pruvon pri plena posedo de la lingvo. La kotizo por la ekzameno estas 7,20 gld. aŭ egalvaloro, kaj devas esti pagita samtempe. Por kandidato, kiu pro registaraj reguloj absolute ne povas antaŭpagi la kotizon, sed kiu vere atendas ĉeesti la Kongreson, ekzistas ebleco de speciala aranĝo.

Laŭ la Regularo de IEK, sukceso en la ekzameno devas "atesti, surbaze de rigora ekzameno, la kapablon instrui Esperanton je supera nivelo". Kandidatoj do atendu ekzamenon, kies kriterioj similas tiujn por universitata diplomo. Detala regularo kaj listo de rekomendita literaturo estas ricevebla de la sekretario de la IEK aŭ de la Centra Oficejo de UEA.

DUMVIVAJ DONACOJ

Kiam UEA lanĉis kampanjon por varbi membrojn, en oktobro 1971, multaj legantoj tuj plenumis nian peton. Interalie venis letero de G. Sch. en okcidenta Berlino, kiu entuziasme subtenis la kampanjon sed bedaŭris, ke li ne konas persone iun, kiun li povus varbi. Anstataŭ tio, li proponis helpi, donacante unu kotizon de dumviva membro al iu merita persono en netranspagipova lando. La Centra Oficejo elektis por li tian personon en Koreujo, kaj tiu skribis al la donacinto leteron tiel varman, ke li decidis tuj donaci du pliajn kotizojn de dumviva membro. Rezulte, UEA nun havas tri novajn dumvivajn membrojn – en Koreujo, Soveta Unio kaj Vjetnamujo – kiuj sen tio ne estus povintaj membriĝi. Dankon al la malavara donacinto!

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Dza Trang, Gia-dinh, Vjetnamujo
Jackson, Mervyn C., Bracknell, Britujo
Kennedy, s-ino M., Bishop Auckland, Britujo
Schippers, H. M., Utrecht, Nederlando

NOVAJ MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1972

40 D. Kennedy, 41 f-ino C. H. Pearson, 42 L. F. Robinson; Britujo. 43 Arne Blume, 44 E. Hansen, 45 Kay Mikkelsen, 46 J. Pedersen, 47 B. S. Trier; Danlando. 48 Georges Larglantier, Francujo. 49 Werner Heinrich, 50 Leo Jolliet; F. R. Germanujo. 51 A. Enriquez de Salamanca, Hispanujo. 52 s-ino Henia Waksman, Israelo. 53 f-ino Adelina Casetta, 54 A. Lacalendola; Italujo. 55 J. P. van Dijk, 56 f-ino J. Flach, 57 s-ino J. M. Kroon-Rentinck, 58 J. L. Mast, 59 Tj. Postma, 60 A. W. Treurniet, 61 H. Veenstra, 62 f-ino E. L. Wekker; Nederlando. 63 R. Bugge-Paulsen, 64 G. Ringstad; Norvegujo. 65 f-ino M. E. Caetano, Portugalujo. 66 P. Almen, 67 B. Andersson, 68 Ivar Andersson, 69 F. Björklund, 70 Stig H. Carlsson, 71 Einar Dahl, 72 s-ino R. Emson, 73 f-ino Gunnel Fejde, 74 M. Fejde, 75 B. Fingalsson, 76 s-ino R. Gullberg, 77 K. Gustafsson, 78 H. Hakansson, 79 E. Johansson, 80 Henrik Karlsson, 81 D. Kullberg, 82 E. Lindberg, 83 Karl J. Moberg, 84 S. Möllestad, 85 s-ino G. Nordström, 86 Sven Nummelin, 87 Gösta Persson, 88 Folke Pettersson, 89 Henry Rydberg, 90 s-ino K. Sehlstedt, 91 s-ino A. Snarberg, 92 Jack Snarberg, 93 Einar Sundborg, 94 s-ino Rut Svärd, 95 K. Viklund, 96 s-ino Anna Wedholm; Svedujo. 97 Alfonso Correa, 98 s-ino D. Googin, 99 W. R. Harmon, 100 s-ino F. Hasselriis, 101 D. M. Keedy, 102 Paul E. Nace, 103 W. C. Nelson, 104 René Oehler, 105 V. Palermo, 106 W. P. Simpson, 107 Tom Haxby; Usono. 108 H. C. Luyke, Nederlando.


DONACOJ (gld.)

Fondaĵo Canuto: Svedujo: ges-roj Luin, 56,–. Sumo ĝisnuna 1971: 1 533,25.

Ĝenerala kaso: Aŭstrujo: Otto Stöber, 13,75. F.R. Germanujo: W. Barnickel, 5,12; Franz Liebel, 5,15. Kanado: f-ino B. Salt, 43,63. Svedujo: Paul Almén, 74,31; Gustav Anderson, 33,25; esperantistoj en Örebro, 661,07. Sumo ĝisnuna 1971: 4 325,77.

Kampanjo "100 x 100": Por ke 100 personoj devigu sin donaci ĉiujare dum tri jaroj ekde 1971 po 100 gld. aldone al la kutimaj kotizoj kaj donacoj.)

ANONCETOJ



18-jara lernantino Zuzanna Niewiarowska (adreso: W. Morcinka 21, Katowice, Pollando) deziras korespondi kun gejunuloj el la tuta mondo.

Esperanto-Grupo de Wunfrun, Wunfrun College of Further Education, Paget Road, Wolverhampton, Anglujo, aranĝas leter-vesperon por la 18a de februaro 1972. Ĉiu skribinto ricevos respondon. Provekzemplerojn kaj broŝurojn ni volonte liveros kun nia regiona bulteno, eldonkvanto 300.

Usona fraŭlo (komputil-programisto, motorciklisto) deziras korespondi aŭ interŝanĝi poŝtkartojn. Aparte interesiĝas pri motorciklistoj en Eŭropo. Gene Fellner, 808 No. Mansfield Ave., Los Angeles, Calif. 90038, Usono.

Pm. interŝanĝo pogrande. Minimume 500 pm. en letero el tuta mondo mi interŝanĝas kontraŭ finnaj pm. S-ro Tauno Kostiainen, Siltakatu 1, SF-18100 Heinola, Finnlando.

21-jara studento de medicino ŝatas tutmonde korespondi Esperante kun esperantistoj. Temoj: medicino, desegno kaj lingvoj. Adreso: Mohammed Ali As-Safi, College of Medicine, 4a klaso, Bagdad, Irako.

Aŭkcio de malnovaj Esperanto-libroj okazos dimanĉe 9 aprilo 1972 je 11a horo en Rantzausgade 58A, Kopenhago. Listo kun proks. 300 titoloj (belliteraturaj kaj fakaj) havebla senpage ĉe Kopenhaga Esperantista Klubo, Løvetandsvej 31, DK-2700 Kopenhago, Danlando.

Plenaĝaj Montrealaj gekursanoj havos letervesperon en aprilo. Bonvolu skribi al: Paul Durette, 1445 rue Notre-Dame, St-Sulpice, Cté Assomption, Québec, Kanado. Bv. afranki filatele.

Skribante al UEA, oni bonvolu enmeti kelkajn uzitajn poŝtmarkojn en la koverton, kio multe helpos al UEA finance. Antaŭdankon!

(daŭrigo de p. 39)

47 f-ino J. W. Dijkstra, Nederlando
48 f-ino E. Koopmans, Nederlando
49 La Esperanto-kluboj de Falun kaj Borlänge kaj la Esperanto-distrikto de Dalekarlio, Svedujo
50 Gunnar Jørgensen, Danlando

Patrono A de TEJO 1972: 3 f-ino E. L. Parson, Britujo. 4 P. Bagger, Danlando. 5 G. Becker, F. R. Germanujo. 6 Jos Derks, Monako. 7 H. M. Schippers, Nederlando. 8 Paul Almén, Svedujo. 9 E. C. Pollock, Usono.

Por TEJO: Nederlando: s-ino A. M. Slot, 75,—. Sumo ĝisnuna 1971: 85,92.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo. Universala Esperanto-Asocio

Tarifo: po 0,25 gld. por ĉiu vorto. (Unu internacia respondkupono = 0,45 gld.) Pri la enhavo de la anonc(et)oj respondecas sole nur la anoncantoj.

En kadro de SIA en februaro, ni aranĝos letervesperon. Ĉiuj kontribuoj, korespondpetoj kaj "esperantaĵoj" konvenas. Ĉiu ricevos belan bildkarton pri nia urbo Györ 700-jara! Esperanto-Grupo "Verda stelo", Györ 2, Postafiók 228, Hungarujo.

Deziras korespondi kun la tuta mondo s-ro F. Schouten, P. L. Takstraat 14, Zaandam, Nederlando.

Instruistoj! Atentu! En Danlando okazos Pedagoga Renkontiĝo (31 jul. — 14 aŭg. 1972). Organizas ĝin progresema movado Freinet. Esperanto estas unu el la uzataj lingvoj. Svedoj, danoj, germanoj, nederlandanoj ktp. estos tre bonvenaj. Limdato por aliĝo: 15a de aprilo. Informas detale: G. Lentaigne, 3 av. de la Gaillarde, F-34-Montpellier, Francujo.

Se vi posedas magnetofonon kaj studadas la anglan lingvon, donu kaj ricevu lingvaĵhelpon per dulingva (la via/angla) sonbendinterŝanĝo. Senpage aldonu vian nomon al nia 1972a Adresaro. Nepre klopodu ekinteresi la neesperantistajn lingvointeresatojn pri la internacia lingvo! Detalojn pri via magnetofono, ŝatataj temoj ktp. akceptos: Speedac, 3 Bouverie Road West, Folkestone, Kent, Anglujo.

Kontraŭ ĉiu oficiala poŝtstampo pri Universala Kongreso (antaŭ 1965) ricevota, mi sendos 50 malsamajn kanadajn aŭ usonajn poŝtmarkojn. Paul Mimlitsch, 69 Blanchard, Marlton, NJ 08053, Usono.

Juzio urĝe serĉas sian onklinon, Anna Szeniawska, neŭrologino-kuracistino. Kiu helpus trovi ŝin? Okcidento aŭ Aŭstralio. Postfach 261, CH-1211 Genève-26, Svislando.

Institucio Hodler '68 varme atendas vian subtenon, ĉu per prunto de minimume 1000 gld., ĉu per donac(et)o. La institucio fondiĝis en 1968 por plisolidigi la financan bazon de UEA. Detale informas la administrantino: f-ino M. H. Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70 II R, Rotterdam-3002, Nederlando.

Gajnu donaco-karton de UEA (valoro: 5 guldenoj) pro via artikolo pri vizitinda loko en via lando. Skribu per skribmaŝino aŭ preslitere, maksimume 1,5 paĝoj. Sendu antaŭ la fino de aprilo al JEN-Bulteno, 731 Birmingham Road, Burbank, Calif. 91504, Usono. Ni aperigos en nia bulteno la artikolojn, kiuj gajnos. Estos 3 premioj.

Entuziasmigu novajn gelernantojn kaj montru la Esperantan universalecon, sendante belajn afrankitajn poŝtkartojn al lernejestro J. Carulla, Avda A. Riu 79, Santa Coloma de Gramanet (Barcelona), Hispanujo.

24-a Kongreso de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio, 6-an ĝis 12-a de majo 1972 en Lugano (Sud-Svislando), Petu informojn: Kurt Greutert, Via Monte Ceneri, CH-6512 Giubiasco.

PARAPSIKOLOGIISTOJ

esperantistoj, kiuj ŝatas kolektiĝi idee,
estas petataj tuj skribi al s-ro

Prof-o Corrado Cerri-Calzoni
Casella postale 159, I-13051 Biella, Italujo

ĈU VI DEZIRAS VIAN SPIRITAN PERFEKTIĜON?

KRISTANA AGENDO
NIA HEJMO – AGO KAJ REAGO

Eldono de Federação Espírita Brasileira – Brazilo
Mendebla ĉe Libroservo de UEA

LAŬTEMA VORTARO

Esperanto – Angla – Franca – Hispana



27200 vortoj en 4 lingvoj.
90 temoj, 234 paĝoj,
17 x 12 cm.

Prezo: 3 usonaj dolaroj
(Pagoj al Buenos Aires)

Prof. Adan Hrynkiewicz,
C.C. 3134, Correo Central,
BUENOS AIRES
(Argentino)

Por subteni la Kongreson



montri solidarecon
informi la publikon

ankaŭ vi povas:

ALIĜI SIMBOLE AL LA 57-A KONGRESO

Simbola aliĝanto pagas 30,– gld. aŭ egalvaloron kaj ricevas post la UK ĝiajn insignon, kongresan libron ktp.

UZI LA KONGRESAJN GLUMARKOJN

sur ĉiuj viaj korespondaĵoj. Ĉe la Libroservo de UEA ili kostas po 0,55 gld., inkluzive de afranko, por 10-marka folio.

Kristalojn **Mineralojn**

ĉiuspecajn el la tuta mondo mi deziras aĉeti daŭre. Aŭ rekte el minejoj aŭ tutaj kolektoj.

Skribu al: Harry Borchert (Mineraloj), D-3392 Clausthal-Zellerfeld, Adolf Römerstr. 17, F. R. Germanujo.



La lasta manuskripto de d-ro Zamenhof

H.C. ANDERSEN

FABELOJ

(IV-a volumo)

Tradukis d-ro L.L. Zamenhof

53 originalaj desegnaĵoj de A. Uniechowski

244 paĝoj

Prezo: 3 us. dol. (42 steloj)
(Ĉiu ekzemplero entenas rabatkuponon en valoro de 0,30 us. dol. por aĉeto de "Fabeloj, vol. I".)

Eldonis: Heroldo de Esperanto
13 rue de la Reinette (Pippelingstr.),
B 1000 Bruselo.

Mendu ĉe la eldoninto aŭ ĉe UEA

INTERLINGVISTIKA INFORMA SERVO

prezentas ĉiam novajn kontribuaĵojn al la diskutoj pri modernaj demandoj el la interlingva problemaro. Kiu volas informiĝi pri opinioj esprimitaj kaj multaj aliaj rimarkindaĵoj el la evoluo favora al Esperanto, legu tiun interesan periodaĵon kun enhavo alie ne trovebla, nun jam en la 15a jaro eldonatan de

Societo por Internacia Lingvo

redaktoro: D-ro Artur Bormann

en: Schaumanns Kamp 126
D-2057 Reinbek

Jarabono: 15 internaciaj respondkuponoj aŭ egalvaloro. Ni invitas peti provnumeron. Ĝi kontentigos ĉiun serioze-interesiton.

HELSINGÖR 1972

La internaciaj feriaj Esperanto-kursoj okazos en la internacia Altlernejo de Helsingör (tute moderna) dum la semajno 23-30 de julio (tuj antaŭ Frosta-vallen). Venu por ĝui vere interesan ferio-semajnon inter samideanoj el multaj landoj!

L. Friis,
Ingemannsvej 9,
DK-8230 Aabyhøj, Danlando

Fondita en 1966

LA LINGUA INTERNAZIONALE

Iama "L'Araldo Esperantista" (1926) **ESPERANTO**

Fondinto-Redaktoro: Corrado Cerri-Calzoni

Itallingva poresperanta gazeto.
Formato cm. 32 x 44. 4-paĝa. 5-kolona. Papero flavkolora. Verda inko. Presita. Ilustrita. Trimonata. Absolute neŭtrala.

Ne estas fiksita abonkotizo. Ĝi estas sendata al tiuj personoj itallingvoparolantaj, kiuj faras ofer-donon (valoron de unu paketo da cigaredoj) kaj interesiĝas pri la internacilingva problemo.

SENPAGE ĝi aperigas korespondajn anoncetojn de es-perantistoj tutmondaj, kiuj deziras ekrilati kun "ital-(in)oj". KOMPENSU aldonante "uzitajn poŝtmar-kojn", kies valoro (antaŭ nuligoj) sufiĉu por afranko de registrita letero al eksterlando.

Adreso: LA LINGUA INTERNAZIONALE esperanto
(Direttore: Corrado Cerri-Calzoni)
Casella Postale 159, I-13051 BIELLA (VC)
Pĉk: Corrado Cerri, Direktoro LI-espo, n. 5-742, I-13051 Biella (VC).

HUNGARA KULTUR-FESTIVALO

— **sub aŭspicio de UEA**

BUDAPEST
17 -23 julio 1972

Kulturaj programoj:

- *Prezento de la hungara literaturo, poezio kaj prozo*
- *La hungara muziko*
- *Kanto kaj ĥoroj*
- *Folklor-prezentado*
- *Filmoprezentadoj*

Aliĝantoj rajtas:

- *Partopreni la programerojn de la Festivalo*
- *En la jaro 1972 ricevas senpage la revuon "Hungara Vivo"*
- *Rajtas uzi la servojn de la Festivalo (loĝiga, ekskursa kaj aliaj servoj)*

Aliĝkotizo: 30,— nederlandaj guldenoj.

Detalan informon petu de la organizanto:
HUNGARA ESPERANTO-ASOCIO, Budapest 5, Poŝtfako 193.